

CERBE kaj KORE



**KULTURA SUPLEMENTO
ALLA REVUO "PONTO" N-RO 115**

N-RO 17 (85), NOVEMBRO 2020

Enhavo

Originala poezio

Aŭtunaj poemoj

Mikaelo Bronŝtejn

“Angoro iom premas en la brusto”	3
“Mi miajn revojn rekonmetas”	3
“Trivialo tro trompemas”	3
Papilia aŭtuno	4
“Sur la tegmento de mia aĝego”	5
“En la pandemia fia fluo”	5
“Denove televid’ hirtigas harojn”	6
“La novembra suno – avareta”	6
“La vivo vere daŭras ĝentlemane”	7
“Mia ploro restu por mi”	7

Klara Ilutoviĉ

Pomarboj laŭlonge de stratoj	8
Malbonaj novaĵoj	8
Gepatroj de teroristo	9

Tradukita poezio:

Datrevenoj de la rusa kulturo

Ivan Bunin. 150 jaroj post la naskiĝo

“Ĉe vojo verdas denso abiara. Trad. K. Ilutoviĉ	10
---	----

Aleksandr Blok. 140 jaroj post la naskiĝo.

Enkonduko de L. Novikova	11
“Knabino kantis en templa ĥoro”. Trad. N. Gudskov	12
“Nokt’, strato, apotek’, lanterno”. Trad. L. Novikova	12
“Ŝi venis de la frosto ruĝiĝinta”. Trad. de N. Procenko kaj N. Gudskov	13
Rusio. Trad. L. Novikova	14
Skitoj. Trad. L. Novikova	16
Sonĝo. Trad. L. Novikova	19

Afanasij Fet. 200 jaroj post la naskiĝo.

Enkonduko de L. Novikova.	20
Serenado. Trad. L. Novikova	20
“Ho, longe en silent’ de l’nokto malsereana”. Trad. L. Novikova	21
“Bela bild’ – pejzaĝo”. Trad. L. Novikova	22
“Luna nokto. Spir’ timema”. Trad. L. Novikova kaj G. Deŝkin	

L. Novikova. Omaĝe al la 120-jara naskiĝ-datreveno de Miĥail Isakovskij.

M. Isakovskij	23
Ĝis revido	23
Katjuŝa. Trad. de K. Gusev	24

Prozo dw esperantistoj

Tamara Andreeva. La lingvo venigis ĝis eksterlando. Esperantigis K. Ilutoviĉ kaj S. Smetanina	25
--	----

Anonco.

Starigo de nova literatura premio “Laŭro de la Akademio”	46
--	----

Kanto

Klara Ilutoviĉ/Mikaelo Povorin. Kronvira marŝo	47
--	----

Aŭtunaj poemoj

Mikaelo Bronŝtejn



Angoro iom premas en la brusto,
Mi mave dormis - kulpas la vetero.
La tutan nokton verŝis la aŭgusto
La lastajn tristajn larmojn de l'somero.
Ventego vante foliaron pelas,
Forblovas pluvajn larmojn de sur floroj...
Sed scias mi, ke tamen vivo belas
Dum koron plu ĝojigas la koloroj -
La bunta finsomera flora gamo,
Refreŝiganta remetitajn sentojn...
Kaj mi denove rimas: "amo – flamo",
Kaj kun ventego pelas for turmentojn.
01.09.2020

Mi miajn revojn rekunmetas
Sidante ĉe l'ekran' embuske.
Ĝi certe estas mia ruz' ke
Senreve mi ne plu poetas.
La kronvirusoj, gripoj porkaj
Timigas min, sed nur distance.
Ekĝermas revoj en la kor', kaj
Klavaron tuŝos mia man' se
La revoj en la fingrojn fluos
Sengene, senkompate, verve,
Kaj verslinioj pluos, pluos –
Kiel en junio – senrezerve.
06.10.2020

Triviale tro trompemas,
Trude trovas trukajn truojn,
Kaj transture triboj tremas, -
Trejnas la trumpetajn bruojn.
Trafas min triobla truko:
Trista tril' de trobadoroj,
Triangula trot' de trupo,
Tranĉa treno de traktoroj.
Kaj triumfas enkulture
Traba, treta, tripa premo,
Kaj travidas mi vulture
Tredon de trotoleremo.
10.09.2020

Papilia aŭtuno

*Fine al mia regiono venis tiu ĉarma
nelonga tempo, kiun mi nomis Papilia aŭtuno.*

Papilia aŭtun' .
La aero plenplenas je revoj.
Adiaŭas anseroj –
kojno flugas al sud' super mi.
Kaj hezitas mi nun
inter miaj preferoj kaj devoj,
inter vero kaj vero, –
la realo kaj la iluzi' .
Ion kaŝas maten' .
Savas min konifera arbar' de
turmentiĝ' triviala
per amika humida brakum' .
Mi liberas, kaj sen
konsekvenca pensad' , malmingarde,
sen serĉado kiala
simple paŝas al fora eklum' .
Ĉu naskiĝas la ver' -
absoluta, senduba, difina -
en senzorga paŝado,
en la pina kaj muska ekspir'??
Min alvokas sincer'
de l' malkaŝa rigardo virina,
kaj forestas la pado,
kiu gvidas al saĝa elir' .

23.09.2020



Sur la tegmento de mia aĝego
Sidas mi antaŭ la flugo ĉielen.
Brue guaro forflugas en grego
Suden, kaj veo aperas sen cel' en
Mia gitaro, tuŝante la kordojn
Per la aŭtuna, nebula humoro,
Kvazaŭ sopire ovriĝas la pord' en
Kor' mia por enamiĝo aŭ ploro.
Kaj, imitante la gruan ekkriion,
Grizon de l'barbo levante al vento,
Krias subite mi ja ne "Adiaŭ!",
Sed – "Ĝis revido! Ĝis nova printempo!"

08.10.2020



En la pandemia fia fluo
Nebuliĝas mia sekva jar',
Mornas tero. Mornas ĉielbluo.
Mornas mi en miaj pensoj, ĉar
Hejma sido jam tro forte lezas
La animon, eman flugi for,
Kaj la tagoj pezas, pezas, pezas
Kaj folie falas teren por
Transformiĝi en la saman teron,
Krei grundon por la nova gent' ...
Ja ĉeestas plumba kruda ver' en
La senmovo antaŭ vintra ven'.
Freŝa neĝo, sen skrupul' kovronta
Ĉion ĉirkaŭ mi per pura blank',
Novan rondon en la iro ronda
Markos, kaj vekigis la elan'
Al revado, kaj kresketos feble,
Konstatante por la pensa klar',
Ke ja daŭras viv', do, kompreneble,
Venos ŝanĝoj en la nova jar'.
24.10.2020

Denove televid' hirtigas harojn
Restintajn sur kalvaĵo olda mia,
Mi viŝas pretervolan larmon, ĉar en
TV ne ĉefas temo pandemia,
Ĉar raportistoj nun ekstreme prancas,
Apenaŭ trovas vortojn por komentoj,
Ĉar en Eŭropo oni kapojn tranĉas,
Ĉar regas sango inter la eventoj.
Mi skrapas nukon senkomprene – kio
En la jarcent' dudek unua, klera,
Persvadas homojn al la ag' rabia?
Se religio - do la plej kolera
Malakceptanta sen toler' plej eta
Liberon alipensi. Aksiomo:
La homo, apudulojn murdi preta,
Ja laŭsence ne plu estas homo.
Ne serĉu vane vojojn por eskapoj –
Nenien fuĝos vi eĉ per galopo.
Se en Eŭropo oni tranĉas kapojn,
Ĉu l' kontinento restas plu Eŭropo?

01.11.2020



La novembra suno – avareta,
Dorlotanta, vere, tre malofte,
Por hodiaŭ tamen estas preta
Varmon plu oferi laŭ bontrov' de
Iu, kiu sidas en la bluo
Kaj kompatas la velkantajn florojn,
Iu, kiu vidas ke enuo
Mankas, dum mi faras la laborojn,
Ja farendajn nepre en aŭtuno
Por postvintre, ĉe l' printempa veno
Malavare la aprila suno
Vartu l' teron kun tenera beno,
Por vekiĝu are la tulipoj
En la bulboj sub la tertavolo,
Por ke miajn trovu viaj lipoj
Printempece, laŭ ambaŭa volo.


07.11.2020



La vivo vere daŭras ĝentlemane –
Por ke la tag' ne vane flugu for
Mia raci', la koron akompane,
Agitas ke mi tuj voĉdonu por
Florĉarmo, ĉokolado, brandogluto
Sen rimorset', sen stulta pardonpent'.
Se simpla ĝuo min tuŝetas plu, do
En mian mondon venas nova sent'!
15.11.2020



Mia ploro restu por mi,
Larmojn mi ne ŝatus dividi.
Mia ĝojo iru al vi,
Ĉar vi devas nur ĝojon vidi.
En rutine bizara viv'
Niaj larmoj ja forgesendas,
Spronas vivi plu la motiv',
Ke nin ĝojo tamen atendas.
19.11.2020




Pomarboj laŭlonge de stratoj

Sovaĝaj pomarboj. Iliaj pomoj
Ĉe stratoj en gaso kaj fumo
Ne kreskas manĝebla por ĉeaj homoj
Ne helpas abunda sunlumo.

Laŭ stratoj tuttage l'trafik' intensas
Venenoj plenigas aeron.
Kaj pomoj sovaĝaj sur arboj densas –
Ĉu por simple fali sur teron?

Peziĝas plu branĉoj ĉe aŭtaj zumoj,
Sen zorgoj de l'plena kultivo,
Lasite al ajnaj naturaj umoj,
Al senkompateco de l'vivo...



Malbonaj novaĵoj

Alvenas ĉiam nova nervotorda ver'.
Timige nigraj fortoj ne ripozas.
Asteroido proksimiĝas al la Ter'
La kronvirus' obstine furiozas.

Kaj sonas trankviligaj argumentoj plu
Por duboj, malatentoj kaj rezistoj.
Ne haltas tamen la animvevena flu',
Ne helpas konvinkem' de sciencistoj.

Kaj ŝanceliĝas firma bildo de la mond'.
La viv' timigas. Guto ŝtonon boras.
Makabraj vortoj de aŭguroj pri l' estont'
Vivdonajn fortojn senkompatate voras.

Misteras interlig' de l' penso, vort' kaj far'.
La destinita ĉiun iam trovos.
Ion malb onan, detruontan per amar'
malbonaj pensoj rapidigi povas.

Forlasu la vivadon en terur' aŭ splen',
La plag' eĉ atendente malutilas!
Kiel venigi sin al saĝ' de la sinten'?'
Aŭskulti kaj kunsenti tre facilas...

Gepatroj de teroristo

Kiel fartas gepatroj
De junul'-teroristo?
Ja senkulpe suferas
Ili pro sia fil'!
De l' surkoraj cikatroj
Neniiga persist
L' puran vivon superas,
Mankas lok' por trankvil'.

Kiu al li sigestis
Devon pri eksplodigo
De lernejoj, de domoj,
De la paca vivad'?'
Kial do ektempestis
Lia krima instigo
Malamika por homoj
Sur honesta vipad'?'

Kiel oni rilatas
Nun al patro, patrino,
Kies fil' vivis plage
Por la hejm kaj popol'?'
Ja ne ĉiuj kompatas
Ilin je la inklino
Helpi ilin ĉe sage
Vunda fremda parol'!

Oni lasu en paco
Malfeliĉajn najbarojn,
Kiuj simple ne scias,
Kiel plu vivi nun!
Ĉu troveblas kuraco
Porti l' filajn krimfarojn,
La vivado glacias
Je maljusto de l' pun...

Datrevenoj de la rusa kulturo

Ivan Bunin

150 jaroj post la naskiĝo



Ivan Alekseevič Bunin (10.10.1870–8.11.1953) estas la unua rusa verkisto, kiu ricevis Nobelpremion. Naskiĝinte en Rusio, post la 2-a Rusa revolucio li formigris al Francio (en 1920), kie vivis la lastan parton de la vivo. Nuntempe li estas plejofte memorata kiel prozisto, aŭtoro de romanoj “Vivo de Arsenjev”, noveloj kaj rakontoj “Vilaĝo”, “Amo de Miĉjo”, “Leĝera spiro”, “Sinjoro el San-Francisko”, beletra taglibro “Damnitaj tagoj” ka. – ĝuste pro la prozaj verkoj li nobelpremiĝis en 1933, sed li estis ankaŭ brila poeto, kaj komence famiĝis pro siaj poeziaj libroj kaj tradukoj.

Густой зелёный ельник у дороги,
Глубокие пушистые снега.
В них шёл олень, могучий,
тонконогий,
К спине откинув тяжкие рога.

Вот след его. Здесь натоптал тропинок,
Здесь ёлку гнул и белым зубом скрёб —
И много хвойных крестиков, остинок
Осыпалось с макушки на сугроб.

Вот снова след, размеренный и редкий,
И вдруг — прыжок! И далеко в лугу
Теряется собачий гон — и ветки,
Обитые рогами на бегу...

О, как легко он уходил долиной!
Как бешено, в избытке свежих сил,
В стремительности радостно-звериной,
Он красоту от смерти уносил!

1905

Ĉe vojo verdas denso abiara,
Lanugas ter' en la neĝega vest'.
Kaj laŭe paŝis cervo temerara —
L' maldikpieda kaj pezkorna best'.

Jen lia spur'. Laŭ padoj li impetis,
Abion ronĝis jen per blanka dent',
Kaj sur neĝdunon liakure ĵetis
Pinglokrucetojn kaj branĉetojn vent'.

Aperis lia ritma spuro nova,
Jen — salt'! Kaj en herbeja neĝvelur'
Ne plu videblas hundo spurotrova,
Rompitas korne branĉoj dum la kur'...

Kiel facile flugis li laŭ valo!
Senbride je l' abunda freŝa fort'
Kaj bestimpeta ĝoj' de l' vivbatalo
Li portis sian belon for de l' mort'!

Tradukis Klara Ilutovič, 2020

Aleksandr Blok

140 jaroj post la naskiĝo



Aleksandr Aleksandroviĉ Blok (28.11.1880 – 07.08.1921) apartenas al la periodo de t.n. “Arĝenta epoko” de la rusa literaturo, kiu daŭris ekde fino de la 19-a jarcento ĝis la 1920-aj jaroj. Li estas unu el la plej grandaj reprezentantoj de la rusa simbolismo de la 20-a jarcento, de ĝia branĉo “novsimbolismo”.

Por kompreni profundan sencon de la poemoj de Blok de la komenca periodo de lia kreado, necesas klarigi, kio estas simbolismo. La vorto “simbolismo” mem indikas la ĉefan trajton de tiu ĉi koncepto. Diference de verkistoj-realistoj,

simbolistoj ne uzis la vortojn en ties rektaj signifoj, sed anstataŭis ilin per simboloj – abstraktaj nocioj, kiuj ne reflektas la realon, sed estas signoj de alia, ideala mondo. Ili estas neklarsignifaj, aludaj, mistikismaj kaj ligas la realan mondon kun la mondoj transcendentaj. Se diri ankoraŭ pli simple, se la versaĵoj ne eblas kompreni sen speciala komento aŭ eĉ tute ne eblas komenti ĝin – tio vere estas simbolisma kreaĵo.

*Bona ekzemplo de simbolismo de frua Blok estas lia versaĵo “**Knabino kantis en templa ĥoro**” (1905). Sen speciala komento ni ne komprenos, ke ĝi temas pri la tragikaj eventoj de la perejo de la rusa eskadro dum la Cusima batalo en la jaro 1905. La poeto ne rakontas pri tiuj eventoj, sed nur aludas pri ili per religiaj simboloj.*

*La alia mallonga versaĵo de Blok “**Nokt’, strato’ apotek’, lanterno**” (1912) estas la plej konata ne nur en nia lando, sed ankaŭ ekster ĝiaj limoj. Ĝi ne nur estis tradukita al pluraj lingvoj, sed estis honorita en la nederlanda urbo Leiden en kadroj de la kultura projekto «Wall poems» (“Surmuraj poemoj”): tiu ĉi versaĵo estas publikigita en formo de t.n. “muralo” (sur muro de unu el la domoj de la urbo). Malgraŭ ĝia mallongeco ĝi estas sencoplena, filozofie profunda. Tiu ĉi poemo estas unu el la provoj de la poeto kompreni, por kio la homo aperas en la mondo. Al tiu ĉi periodo juneca romantikeco de Blok jam malaperis, li perceptas la realan mondon sen ajnaj iluzioj. La vivo por li estas sensenca fermita cirklo.*

*La poemon “**Rusio**” (1908) de Blok ni povas nomi civitisma, patriotisma. Ĝi temas pri la antaŭevolucia Rusio, kaj la bildo de la mizera rusia vivo estas tute realisma: grizaj kabanoj, kotaj vojoj... Sed ni denove vidas en la poemo simbolon: tiun de Rusio-Virino kun “belaj trajtoj de l’ vizaĝ’”. Sed diference disde la Belega Damo el la frua romantikeca, simbolisma versciklo de Blok, kiu estis nur revo, nur iluzio, tiu ĉi simbolo de la virino-hejmlando estas jam tute realeca kun siaj “bunta*

tuk' ĝis brovlini''', kun siaj terecaj zorgoj kaj plagoj. Kaj sentoj de la poeto, lia amo al la patrin-tero estas hela malgraŭ la ĉagreniĝo pro vido de ties malprospero.

Blok ankaŭ verkis poeziajn fabelojn por infanoj, kiuj certe estas la plej helaj kaj sen komentoj kompreneblaj por ĉiuj. La poemo "Songoj", verkita en 1912, kronis tiun ĉi versciklon. En la 1970-aj jaroj esperantisto Alekseo Fomin el la urala urbo Miass verkis belan melodion por tiu ĉi fabelo kaj mi tradukis ĝin en Esperanton. La kanto iĝis sufiĉe populara en la Esperanto-medio. Sed pli poste mi trovis en ĝi diversajn malĝustajojn kaj korektis la tekston.

Ludmila Novikova

Девушка пела в церковном хоре
О всех усталых в чужом краю,
О всех кораблях, ушедших в море,
О всех, забывших радость свою.

Так пел ее голос, летящий в купол,
И луч сиял на белом плече,
И каждый из мрака смотрел и слушал,
Как белое платье пело в луче.

И всем казалось, что радость будет,
Что в тихой заводи все корабли,
Что на чужбине усталые люди
Светлую жизнь себе обрели.

И голос был сладок, и луч был тонок,
И только высоко, у царских врат,
Причастный тайнам, плакал ребенок
О том, что никто не придет назад.
1905

Knabino kantis en templa ĥoro
Pri ĉiuj lacaj sur fremda ter',
Pri ĉiuj ŝipoj en mara foro,
Pri ĉiuj vagaj sen ĝoj kaj ver'.

La voĉo ŝvebis, dolĉa kaj pura,
Sur blanka ŝultro brilis radi',
Kaj ĉiu atentis el obskuro
La blankan robon en luma stri'.

Kaj ĉiu pensis, ke ĝojo venos,
Ke ŝipoj havenon atingos tuj,
Ke al laculoj jam apartenas
Serena vivo en fora fremduj'.

La voĉ' kaj radio mallumon boris.
Nur sore, ĉe Caro, pro vana pen'
Konanta misterojn, infano ploris
Pri tio, ke eblas nenies reven'.

Trad. Nikolao Gudskov, 1988

Ночь, улица, фонарь, аптека,
Бессмысленный и тусклый свет.
Живи еще хоть четверть века –
Всё будет так. Исхода нет.

Умрѣшь – начнёшь опять
начала.
И повторится всё, как встарь:
Ночь, ледяная рябь канала,
Аптека, улица, фонарь.
1912

Nokt', strato, apotek', lanterno,
Sensenca pala iluminin'.
Kaj vivu vi eĉ dum eterno –
Por ĉio ĉi ne estos fin'.

Se mortos vi pro la fatalo,
Denove ekruliĝos rad':
Nokt', frida brilo de l' kanalo,
Lanterno, apoteko, strat'.

Trad. Ludmiola Novikova, 1985

***	***	***
<p>Она пришла с мороза, Раскрасневшаяся, Наполнила комнату Ароматом воздуха и духов, Звонким голосом И совсем неуважительной к занятиям Болтовнёй.</p>	<p>Ŝi venis kun frosto, Ruĝvanga, Saturis la ĉambrom Per aer' kaj parfumo, Kaj sonoro de l' voĉo Kaj per nerespektema al studaj okupoj Babilo.</p>	<p>Ŝi venis de la frosto Ruĝiĝinta Plenigis la ĉambrom Per arom' de l' aer' kaj parfum', Sonora voĉo Kaj tute malestimanta l' okupojn Babilo.</p>
<p>Она немедленно уронила на пол Толстый том художественного журнала, И сейчас же стало казаться, Что в моей большой комнате Очень мало места.</p>	<p>Tuj post ven' ŝi faligis sur plankon Dikan volumon de beletra revuo Kaj la ĉambrom plenigis ekŝajno, Ke en ĝia granda Tre malmultas da loko.</p>	<p>Ŝi senprokraste faligis sur plankon Dikan brikon de l' arta revuo, Kaj tuj ekŝajnis, Ke en mia ĉambrego Treege malmultas loko.</p>
<p>Всё это было немножко досадно И довольно нелепо. Впрочем, она захотела, Чтобы я читал ей вслух "Макбета".</p>	<p>Tio vekis ioman domaĝon Kaj sufiĉan konfuzon. Cetere, ŝi ekdeziris, Ke mi legu al ŝi el «Makbeto».</p>	<p>Ĉio iom ĉagrenis Kaj sufiĉe absurdis. Cetere, ŝi ekdeziris, Ke mi laŭtleĝu "Makbeton".</p>
<p>Едва дойдя до пузырей земли, О которых я не могу говорить без волнения, Я заметил, что она тоже волнуется И внимательно смотрит в окно.</p>	<p>Atinginte la lokon pri <i>bobeloj de tero</i>, Pri kiuj mi ne povas paroli trankvile, Mi rimarkis, ke ankaŭ ŝin regas emocioj, Kaj ŝi atente rigardas tra la fenestro.</p>	<p>Apenaŭ atingis mi la tervezikojn Pri kiuj mi ĉiam emociiĝas, Mi rimarkis ŝin ankaŭ emociiĝi Kaj atente tra l' fenstron rigardi.</p>
<p>Оказалось, что большой пёстрый кот С трудом лепится по краю крыши, Подстерегая целующихся голубей.</p>	<p>Evidentiĝis, ke granda makulfela kato Pene sin lokas sur rando de la tegmento, Gvatante kolombojn interkisantajn.</p>	<p>Tie ja granda bunta kato, Pene sur rand' de l' tegment' sin tenanta, Embuskis interkisantajn kolombojn.</p>
<p>Я рассердился больше всего на то,</p>	<p>Min incitis kolero – ĉefe pro tio,</p>	<p>Mi ekkoleris pleje pro tio,</p>

Что целовались не мы,
а голуби,
И что прошли времена
Паоло и Франчески.

06.02.1908

Ke kisojn interŝanĝis
kolomboj, anstataŭ ni,
Kaj ke jam pasis la
tempoj de Paolo kaj
Franĉeska.

El la rusa *N. Procenko*,
1990

Ke interkisis ne ni, sed
kolomboj,
Kaj ke pasis l' epoko de
Páolo kaj Franĉeska.

Esperantigis *Nikolao
Gudskov*
17.02.2020



Россия

Rusio

Опять, как в годы золотые,
Три стертых треплются шлеи,
И вязнут спицы расписные
В расхлябанные колени...

Россия, нищая Россия,
Мне избы серые твои,
Твои мне песни ветровые, -
Как слезы первые любви!

Тебя жалеть я не умею
И крест свой бережно несу...
Какому хочешь чародею
Отдай разбойную красоту!

Пускай заманит и обманет, -
Не пропадешь, не сгинешь ты,
И лишь забота затуманит
Твои прекрасные черты...

Ну что ж? Одно заботой боле -
Одной слезой река шумней,
А ты все та же - лес, да поле,
Да плат узорный до бровей...

Samkiel en la jaroj oraj
Min portas ĉar' de ĉevaltri',
Kaj dronas spokoj buntkoloraj
En kotaj sulkoj de vojstri'...

Rusio, mizerin' Rusio,
Kaj venta kant', kaj grizkaban'
Eterna estas nostalgio,
La larmoj de l' unua am'!

Mi ne konsolas vin en plago,
Zorgportas mian krucon mi...
Fordoni al hazarda mago
Senbridan belon povas vi !

Se li allogos kaj mensogos, -
Vi ne pereos pro damaĝ',
Kaj nur zorgemo nebulkovros
Belegajn trajtojn de l' vizaĝ'...

Je guto plios la amaro,
Je larm' pli bruos riverstri',
Sed vi ja samas – kamp', arbaro
Kaj bunta tuk' ĝis brovlini'...

И невозможное возможно,
Дорога долгая легка,
Когда блеснет в дали дорожной
Мгновенный взор из-под платка,
Когда звенит тоской острожной
Глухая песня ямщика!..

1908

Kaj nereala iĝas vera,
La teda voj' ekŝajnas flug',
Se brilos via plenfiĉera
Rigard' momenta elsub tuk',
Se sonos trista kant' koĉera
Dum longa tra l' kampar' konduk'.

Traduko: *Ludmila Novikova* (2016)



Скифы

*Панмонголизм! Хоть имя дико,
Но мне ласкает слух оно.
Владимир Соловьёв*

Мильоны – вас. Нас – тьмы, и тьмы,
и тьмы.
Попробуйте, сразитесь с нами!
Да, скифы – мы! Да, азиаты – мы, –
С раскосыми и жадными очами!

Для вас – века, для нас – единый час.
Мы, как послушные холопы,
Держали щит меж двух враждебных
рас –
Монголов и Европы!

Века, века, ваш старый горн ковал
И заглушал грома лавины,
И дикой сказкой был для вас провал
И Лиссабона, и Мессины!

Вы сотни лет глядели на Восток,
Копя и плавя наши перлы,
И вы, глумясь, считали только срок,
Когда наставить пушек жерла!

Вот – срок настал. Крылами бьёт
беда, -
И каждый день обиды множит,
И день придёт – не будет и следа
От ваших Пестумов, быть может!

О, старый мир! Пока ты не погиб,
Пока томишься мукой сладкой,
Остановись, премудрый, как Эдип,
Пред Сфинксом с древнею
загадкой!..

Россия – Сфинкс. Ликуя и скорбя,
И обливаясь чёрной кровью,
Она глядит, глядит, глядит в тебя,
И с ненавистью, и с любовью!..

Skitoj

*Panmongolism'! Sovaĝa nomo,
Sed ĝi belsonas nun por mi.
Vladimir Solovjov*

Abundas – vi. Sed ni – multoble pli.
Nu, risku nin ataki, fibravuloj!
Jes, skitoj – ni! Jes, azianoj – ni,
Kun strabaj kaj avidaj stretokuloj!

Por vi – jarcent', por ni – nur unu hor'.
Ni kiel obeema servist-opo
Tenadis ŝildon inter svarma hord'
Mongola kaj Eŭropo!

Miljare via forĝo de metal'
Surdigis tondrojn de l' tersino.
Terura signo estis la trafal'
Kaj de Lisbon', kaj de Mesino!

Miljare celis vi al Orient',
Prenante kaj fandante niajn bonojn,
Kaj vi kalkulis nur pri la moment',
Kiam direkti la kanonojn!

Jen ĉi moment' de plagoj kaj terur' –
Dum ĉiu tag' ofendoj plias,
Kaj venos tag' – ne restos eĉ la spur'
De via *Paestum*¹, kiu scias!

Ho, olda mond! Ĝis kiam dronos ŝip',
Dum kaptas vin ĝuad' konsterna,
Vi haltu, saĝa kiel reĝ' Edip',
Ĉe Sfinkso kun mister' eterna!

Rusio – Sfinks'. Admire kaj kun plor',
Kaj en la propra sang' dronante,
Ĝi fikse vin rigardas por esplor',
Jen vin amante, jen nur hate.

¹ *Paestum* ['pestum] – antikva greka urbo, kies restaĵoj situas nun en Italio.

Да, так любить, как любит наша
кровь,
Никто из вас давно не любит!
Забыли вы, что в мире есть любовь,
Которая и жжёт, и губит!

Мы любим всё – и жар холодных
числ,
И дар божественных видений,
Нам внятно всё – и острый
галльский смысл,
И сумрачный германский гений...

Мы помним всё – парижских улиц
ад,
И венецянские прохлады,
Лимонных роц далёкий аромат,
И Кёльна дымные громады...

Мы любим плоть – и вкус её, и цвет,
И душный, смертный плоти запах...
Виновны ль мы, коль хрустнет ваш
скелет
В тяжёлых, нежных наших лапах?

Привыкли мы, хватая под уздцы
Играющих коней ретивых,
Ломать коням тяжёлые крестцы,
И усмирять рабынь строптивых...

Придите к нам! От ужасов войны
Придите в мирные объятия!
Пока не поздно – старый меч – в
ножны,
Товарищи, мы станем – братья!

А если нет, нам нечего терять,
И нам доступно вероломство!
Века, века вас будет проклинять
Большое позднее потомство!

Мы широко по дебрям и лесам
Перед Европою пригожей
Расступимся! Мы обернёмся к вам
Своею азиатской рожей!

Идите все, идите на Урал!
Мы очищаем место бою

Jes, ami, kiel amas nia gent',
Vi jam delonge ne kapablas!
Forgesis vi, ke estas tia sent',
De kiu vi sorflugas aŭ nur krablas!

Ni amas ĉion – flugon de spirit',
Inspiron de malvarmo nombra,
Kaj klaras por ni ĉio – gaŭla sprit',
Germana genieco sombra...

Memoras ni ribelojn de Pariz',
Kaj Venecian freŝan vivon,
Aromon de limona paradiz'
Kaj de Kolonjo fummasivon...

Ni ŝatas karnon – guston de la kor',
Odoron de karnaj' ofera...
Ĉu kulpos ni, se krevos via korp'
Pro nia brakumad' tenera?

Kutimas ni, kaptante per bridŝnur',
Rompadi foje firmajn spinojn
De la ĉevaloj ardaĵ en forkur',
Kaj obeigi ĉi sklavinojn...

Do, venu vi de la milita ring'
Al niaj pacaj kunfaradoj!
Dum estas ŝanc' – la glavon al
glaving'!
Najbaroj, estu ni gefratoj!

Se ne – ni rajtas senkulpigigi nin,
Ni rajtas same pri perfidoj!
Kaj dum centjaroj malbenados vin
Viaj malsanaj postaj idoj!

Ni cedos lokon en arbara dens'
Por via eŭropeca belo,
Kaj turnos nin al via ekcelenc'
Per nia aziaĉ-muzelo!

Alvenu ĉiuj, venu al Ural'!

Стальных машин, где дышит
интеграл,
С монгольской дикою ордою!

Но сами мы – отныне – вам не щит,
Отныне в бой не вступим сами!
Мы поглядим, как смертный бой
кипит,
Своими узкими глазами!

Не сдвинемся, когда свирепый гунн
В карманах трупов будет шарить,
Жечь города, и в церковь гнать
табун,
И мясо белых братьев жарить!..

В последний раз – опомнись, старый
мир!
На братский пир труда и мира,
В последний раз – на светлый
братский пир
Сзывает варварская лира!

Ni donos lokon sen spitvorto
Por via ŝtalmaŝina lastbatal’
Kontraŭ mongola sovaĝhordo!

Sed ni de nun ne estos via ŝild’,
Ne estos ni nun naivuloj!
Ni nur rigardos al batala bild’
Per niaj strabaj stretokuloj!

Senmovos ni, kiam kruela hun’
Mokos kadavrojn de l’ soldatoj,
Bruligos viajn urbojn kaj sub lun’
La karnon fritos de la blankaj fratoj!..

En lasta foj’ – decidu, olda mond’!
Invitas ni al pacturniro!
En lasta foj’ – al hela frata rond’
Alvokas la barbara liro!

Traduko de *Ludmila Novikova* (2016)



Сны

И пора уснуть, да жалко,
Не хочу уснуть!
Конь качается качалка,
На коня б скакнуть!

Луч лампадки, как в тумане,
Раз-два, раз-два, раз!..
Идёт конница... а няня
Тянет свой рассказ...

Внемлю сказке древней, древней
О богатырях,
О заморской, о царевне,
О царевне... ах...

Раз-два, раз-два! Конник в латах
Трогает коня
И манит и мчит куда-то
За собой меня...

За моря, за океаны
Он манит и мчит,
В дымно-синие туманы,
Где царевна спит...

Спит в хрустальной, спит в кровати
Долгих сто ночей,
И зелёный свет лампадки
Светит в очи ей...

Под парчами, под лучами
Слышно ей сквозь сны,
Как звенят и бьют мечами
О хрусталь стены...

С кем там бьётся конник гневный,
Бьётся семь ночей?
На седьмую – над царевной
Светлый круг лучей...

И сквозь дрёмные покровы
Стелются лучи,
О тюремные засовы
Звякают ключи...

Сладко дремлет в кровати.
Дремлешь? – Внемлю... сплю.
Луч зелёный, луч лампадки,
Я тебя люблю!

(melodio de A.Fomin)

Songoj

Ĉio dormas en trankvilo,
Nur ne dormas mi,
Sur ĉevalo-balancilo
Volus raidi pli!

Marŝas jen kavalerio,
Unu, du, tri... kvin!..
Kaj en la lucerna strio
Svagas vartistin'...

Sonas la rakont' fabela
Jen pri prodegul',
Jen pri Caridino bela
Sur mirakl-insul'...

Jen rajdant' ĉevalon spronas,
Unu, du, tri... kvin!..
Kaj senvorte li admonas
Kunveturi min...

Al la spaco oceana
Li transportas min,
Kie sur insul' lontana
Dormas Caridin'...

Dormas en litet' kristala
Cent tagnoktojn ŝi,
Sur okulojn ŝian falas
La verduma stri'...

Sub brokato malbeata
Aŭdas ŝi tra dorm',
Kiel sonas, kiel batas
Glavo je marmor'...

Sep tagnoktojn li batalas,
Prodegul'-rajdant',
Post la sepa nokto falas
La prizona krad'...

Tra la dorma pelerino
Trafas suna stri',
Kaj vekigas Caridino,
Kaj eniras mi...

Sonas dolĉa melodio...
Zumas vartistin' '...
Stri' lucerna, verda strio,
Mi adoras vin!

Traduko de L.Novikova

Afanasij Fet

200 jaroj post la naskiĝo



Afanasij FET (05.12.1820 – 03.12.1892). Li naskiĝis laŭ la moderna kalkulo la 5-an de decembro de la jaro 1820 en la bieno Novosjolki de Mcenska ujezdo de la Orjol-gubernio. Li estis fajna poeto-lirikisto, apartenis al la literatura skolo kun titolo “pura arto”, kiu aperis kaj progresis ekde la mezo de 19-a jarcento. Ĉefa koncepto de tiu ĉi skolo estis “arto nur por arto”, deklaro de sendependeco de la arto kaj literaturo de diversaj eksteraj faktoroj: socia vivo, politiko, revoluciaj kaj liberalaj tendencoj. En la poezio de Fet estas tri ĉefaj “eternaj” temoj: naturo, amo kaj arto, kaj tiujn ĉi temojn kronas la ĉefa temo – Belo, kiu estas la plej granda valoro por la homa animo. La

naturo sendepende de la jarperiodo kaj vetero en la versaĵoj de Fet ĉiam estas delikate bela, amo al la virino ravas. Ni legu kelkajn mallongajn versaĵojn de Fet pri la naturo kaj amo, kaj ni sentos, kiom helaj kaj vere belaj – ili estas.

Ludmila Novikova

Серенада

Тихо вечер догорает,
Горы золотя;
Знойный воздух холодает, -
Спи, моё дитя.

Соловьи давно запели,
Сумрак возвестя;
Струны робко зазвенели, -
Спи, моё дитя.

Смотрят ангельские очи,
Трепетно светя;
Так легко дыханье ночи, -
Спи, моё дитя.

1844

Serenado

Sunsubir' la montojn farbas,
Svenas sen rapid';
La aero jam ne varmas, —
Dormu, mia id'.

Najtingaloj trilkanzonas,
Fluas freŝtepid' ;
Jen la kordoj ĉarme sonas, —
Dormu, mia id'.

La okuloj de anĝeloj
Lumas kun trem-mild' ;
Nokto spiras per fabeloj, —
Dormu, mia id'.

Traduko: *Ludmila Novikova (2016)*

О, долго буду я в молчаньи ночи
тайной
Коварный лепет твой, улыбку, взор,
взор случайный,
Перстам послушную волос, волос
твоих густую прядь
Из мыслей изгонять и снова
призывать;
Шептать и поправлять бывшие
выраженья
Речей моих с тобой, исполненных
смущенья,
И в опьянении, наперекор уму,
Заветным именем будить ночную
тьму.
О, долго буду я в молчаньи ночи
тайной
Заветным именем будить ночную
тьму.

Muziko: S. Raĥmaninov

Чудная картина,
Как ты мне родна:
Белая равнина,
Полная луна.

Свет небес высоких,
И блестящий снег,
И саней далёких
Одинокий бег.

Ho, longe en silent' de l'nokto
malserena
Mi pense pelos vin, jen vokos vin, vin
revene,
La silkan strion de harar', harar' en
longa densa plekt',
Kaĵolajn vortojn kaj rigardon kun ridet'.
Mi flustros kun korekt' diraĵojn ĉiujn
miajn
El nia parolad', konfuzo emociajn.
Kaj spite al la saĝ', en febro de l'amor'
Solnomon flustros mi en sombra nokta
hor'.
Ho, longe en silent' de l'nokto
malserena
Solnomon flustros mi en sombra nokta
hor'.

Tradukis Ludmila Novikova (2010)

Bela bild' – pejzaĝo
Por mi kara nun:
Blanka ebenaĵo,
Hela plena lun'.

Ĉiellumo ora,
Brila neĝa pur'
Kaj de sledo fora
Tutsoleca kur'.

Traduko: Ludmila Novikova (2016)



Шёпот, робкое
дыханье,
Трели соловья,
Серебро и колыханье
Сонного ручья,

Свет ночной, ночные
тени,
Тени без конца,
Ряд волшебных
изменений
Милого лица,

В дымных тучках
пурпур розы,
Отблеск янтаря,
И лобзания, и слёзы,
И заря, заря!

1850

Flustro, delikata spiro,
Najtingala tril',
De dormanta roj' suspiro
Kaj arĝenta bril',

Lumo nokta,
noktmiraĝoj,
Ombroj de l' pejzaĝ',
La miraklaj aliŝanĝoj
De la belvizaĝ',

En nebulo roz' purpura,
Roskovrita flor',
Interkisoj, larmo pura,
Kaj aŭror', aŭror'!

*Traduko : Ludmila
Novikova, 2016*

Luna nokto. Spir'
timema.
Kant' de najtingal;
Murmurado de dormema
Riveret' en val'.

Nokta lumo,, ombr'
malhela,
Ombra vic' sen fin'...
De vizaĝo via bela
Ŝanĝoj, amatin'.

Sur nubetoj – rozkoloro,
Brilo de sukcen'.
Kaj kisas'. Kaj dolĉa
ploro.
Kaj de tago ven'!

*Traduko de Georgo
Deŝkin, 1912*



Omaĝe al la 120-jara naskiĝ-datreveno de Miĥail Isakovskij

Ludmila Novikova



Rusa sovetia poeto Miĥail Isakovskij (1900 – 1973) naskiĝis la 19-an de januaro 1900 en la vilaĝo Glotovka de Jelnja ujezdo de la Smolenska gubernio. En 1931 li translokiĝis en Moskvon. En nia lando li plej famas kiel kantpoeto. Multaj kantoj por liaj versaĵoj iĝis tutpopole ŝatataj.

Por esperantistoj Isakovskij estas interesa ankaŭ kiel adepto de Esperanto. En sia aŭtobiografia libro “En la Jelnja terlando” Isakovskij rememoras siajn okupiĝojn pri Esperanto dum la juneco. Li ne nur studis la internacian lingvon kaj korespondis kun alilandaj esperantistoj, sed ankaŭ tradukis kaj originale verkis poemojn, el kiuj konserviĝis, bedaŭrinde, nur unu, verkita okaze de vizito en 1926 al Smolensko de kelkaj

partoprenintoj de la 6-a SAT-kongreso en Leningrado:

Ĝis revido

Nin forlasas eksterlandaj gastoj
Tuj forportos ilin vagonaro
Diras mi en la minuto lasta:
Ĝis revido, kamaradoj karaj.

Baldaŭ, baldaŭ nin disigos limoj,
Vi revenos nun al viaj domoj,
Sed en niaj koroj kaj animoj
Longe restos viaj karaj nomoj.

Vi revenos nun al viaj landoj.
Tie, vin kaŝante de faŝistoj
Vi respondos veron al demandoj
Kiujn al vi faros laboristoj.

Mi bedaŭras, ho, karegaj gastoj,
Jam ekiris via vagonaro.
Diras mi en la momento lasta:
Ĝis revido, kamaradoj karaj.

Supre menciitas, ke multaj kantoj de Isakovskij iĝis vaste konataj, plej fama el kiuj ne nur en nia lando, sed ankaŭ ekster ĝiaj limoj estas certe la kanto “Katjuŝa” kun la teksto de Isakovskij kaj muziko de la fama sovetia komponisto Matvej Blanter. Tamen hodiaŭ estas precipe rimarkinda la kanto “Faŝistoj forbruliĝis ĥaton” kun muziko de M. Blanter, kies tekston Isakovskij verkis en la jaro 1945. Do, ĉi jare estas jubileo de la kanto kaj samtempe ĝi ligas nin kun la alia granda jubileo de nia lando – 75-jara datreveno de la venko en la dua mondmilito kontraŭ la germanaj faŝistoj.

La sorto de la kanto ne estis simpla. Dekomence ĝi estis malpermesita far la sovetiaj oficialuloj por plenumado pro ĝia tragikeca enhavo (oni deklaris, ke la sovetia soldato, venkinto en la milito, ne devas plu plagi). Nur post 15 jaroj dank'al la fama aktoro Mark Bernes, kiu riskis plenumi la kanton dum unu el koncertoj, kaj poste en la televida elsendo "Blua lumeto" la marŝalo Vasilij Ivanoviĉ Ĉujkov spontane petis Berneson plenumi la kanton, ĝi iĝis vaste konata, pro kio ne plu eblis ĝia malpermesado. La kanton tre ekŝatis tuta nialanda popolo.
M. Isakovskij

KATJUŜA

Pomajn florojn vento milde tuŝas,
La nebuloj flosas sur river' .
Sur la krutan bordon nun Katjuŝa
Sola iras en la primaver' .

Sola iras, kante prisopiras
Stepan aglon, kiu flugis for,
La amaton, kiun ŝi aspiras,
Kies vortojn tenas en la kor' .

Ho, kanteto, kanto junulina,
Flugu altan vojon de la sun'
Kaj la karan en la for' landlimon
De Katjuŝa korsalutu nun.

Li revidu ŝin de malproksime
Kaj reaŭdu kanton ŝian tuj,
Kiel amon gardas ŝi anime,
Tiel zorgu li pri la patruj' .

Pomajn florojn vento milde tuŝas,
La nebuloj flosas sur river' ,
Sur la krutan bordon nun Katjuŝa
Sola iras en la primaver' .

Tradukis Konstantin Gusev



Prozo de esperantistoj

Tamara Andreeva



Tamara Sergeevna Andreeva naskiĝis 20.08.1930 – do, ŝi ĵus festis sian 90-jariĝon. Ŝi loĝas en Sankt-Peterburgo kaj estas ekde 1979 esperantistino, partoprenis kelkajn tutlandajn aranĝojn, dum kelkaj jaroj estis prezidanto de Leningrada E-klubo por nevidantoj "Amikaro". Ŝi ĝis nun verkas eseojn kaj rememorojn, sed, ĉefe, en la rusa. Ni publikigas sube du

ŝiajn verkojn, esperantigitajn de moskvaj esperantistoj.

La lingvo venigis ĝis eksterlando

Atinginte la aĝon de 48 jaroj, mi sciis nenion pri la lingvo Esperanto, kreita de la pola okulkuracisto Ludoviko Zamenhof ankoraŭ en la 1887 j. Kaj jen hazarde, elplonĝinte el sapa ŝaŭmo, mi eniĝis en la internacian torenton de Esperanto -movado, dediĉinte al ĝi kelkajn vivjardekojn.

Sen la hazarda renkontiĝo kun la ploranta najbarino la tutmonda movado de esperantistoj por mi pasus nerimarkite. Ŝiaj larmoj ne povis lasi min indiferenta. Evidentiĝis, ke tiun vesperon ŝi devus veturi al Ukrainio, al la tutunia seminario de esperantistoj. Biletoj estis aĉetitaj, mono por gastejo kaj nutrado ĝirita; sed veturi ŝi ne povis: hodiaŭ ekmalsanis ŝia akompanantino. Pri la senelira situacio de la najbarino mi rakontis al miaj hejmanoj. La panjo, la filo kaj la edzo unuanime decidis delegi min kiel ŝian akompanantinon, preninte el familia buĝeto la bezonatan monsumon.

Do, mi trafis sportbazejon apud Kievo, kie kolektiĝis pli ol tricent diversagaĝaj homoj el multaj urboj kaj respublikoj de Sovetunio. Ili parolis la lingvon tute ne similan eĉ unu el la naciaj. La unua vorto, kiun mi eksciis kaj memorfiksis por la tuta vivo, estis «sapo», per kiu mi naskighis kiel esperantistino. Min plenkaptis entuziasmo de tricent homoj.

Matenoj komenciĝadis de komuna kolektiĝo, kie oni anoncis portagan agadprogramon kaj nomojn de «krokodiloj», kiuj antaŭtage parolis en la rusa lingvo. Tial mi sentis min surdomuta. Bone, ke inter la partoprenintoj estis kelkaj nevidantoj, ni forlasadis teritorion de la bazejo kaj «krokodilis».

Post matenmanĝo ĉiuj rapidis al Esperanto-kursoj. Mi venis al grupo de komencantoj. De tagmanĝo ĝis vespermanĝo pasis prelegoj, disputoj. Mi elektis prelegojn... Apudaj aŭskultintoj delikate vekis min, invitante al vespermanĝo. Ĉiuvespere okazis koncertoj, spektakloj, komikaj prezentaĵoj, KGS (klubo de gajaj kaj spritaj). Al mi ŝajnis, ke mi troviĝas en la eta lando, kie forestas krudeco, malodoras per alkoholo, ne aŭdiĝas akraj rusaj esprimoj. Krome, ĉi tie mi komprenis senlimajn eblojn de Esperanto, kiel literatura lingvo. Reveninte al Leningrado, mi aniĝis al dujaraj kursoj de Esperanto, vizitadis aranĝojn en kluboj de vidantaj esperantistoj.

Unu el la celoj de Esperanto estas internacia komunikado Mi komencis aktivan korespondadon kun blinduloj el diversaj landoj, opiniante keleterlegado perfektigos mian lingvoposedon. Sed miaj korespondantoj estis same malspertaj kaj ni malavare interŝanĝis erarojn. Kaj oni metadis al mi strangajn demandojn, ekzemple: „Ĉu vere, ke en viaj urboj ursoj vagas?“ kaj „Ĉu vere, ke ĉe vi oni dormas sub unu litkovrilo?“² Mi ekimagis litkovrilon je amplekso de Kaliningrado ĝis Vladivostoko². Sed kiel honesta homo mi devas konfesi, ke ankaŭ miaj leteroj brilis je „perloj“. Ekzemple, gratulinte unu el amikoj pri la edzina jubileo, mi konfuzis nomojn de lia edzino kaj hundo, proponinte al la jubileanto glatumi la edzinon kaj kisi la hundon. Ĉe nia renkontiĝo la geedzoj rimarkigis, ridante, ke tiu gratulo estis la plej originala kaj memorinda por ĉiam, elvokante ridetojn. Post la letero de viro el Hispanio, en kiu li plendis, ke la edzino batas lin per ŝranko, mi mense frapinte lian kapon per gisa pato, ĉesis la korespondadon. Konatiĝinte kun la tradukita kaj originala beletro, mi decidis turni min al plumo kaj papero, verkinte humuran dialogon inter junulo kaj junulino, kiuj konfuzis la signifon de la vortoj «mano» kaj «mono». Facilas imagi, kion ili petis unu de la alia. Mia unua viktimo iĝis redaktoro de la brajla gazeto»Aŭroro«. Kaj la unuafoje farata blino estis glata.

Mi komencis dissendadi la enhave simplajn rakontojn al aliaj gazetoj, revante havi publikaĵojn en la plej granda kaj diversenhava gazeto»Pola Stelo«. Ĝia redaktoro posedis literaturan Esperanton, publikigis siajn beletrajn verkojn. Atentigi lin pri mi iĝis mia celo...

Al la redaktoro estis senditaj tri longaj leteroj, kie mi elverŝis miajn emociojn pri vizito de Miĥajlovskoje post la milito, kiam en tiuj lokoj estis dume sentata spirito de la puŝkina tempo : sen gastejoj, aŭtoĵ, ĉiĉeronoj. Mi strebis esprimi miajn sentojn kaj bildigi la rusan naturon, kiu inspiris A.S.Puŝkin-on al kreado de ĉefverkoj. En du la plej proksimaj numeroj de la gazeto mi tralegis en la rubriko»Literaturo» mian brile korektitan «Letero el Miĥajlovskoje». Inter ni ekis korespondado. Pli ol 50 leteroj, ricevitaĵ de li, iĝis mia lernolibro por perfektigi de Esperanto-scioj.

Partopreno en literaturaj konkursoj venigis al mi multe da venkoj. Dum pli ol dek jaroj en Litovio mi partoprenis la konkurson „Muzo“ kaj ĉiufoje kunportis diplomon de venkinto. En la konkurso „Kannel“ en Estonio mi venkis trifoje kaj estis premiita per tri medaloj. En la 1979 jaro refundiis la plej malnova klubo de blindaj esperantistoj „Amikaro“. Mi havis honoron dum 10 jaroj gvidi la klubon, sed tio estas alia paĝo de mia biografio...

Inter legantoj de miaj rakontoj aperis dezirantaj korespondi kun mi. Tiel mi akiris amikojn en Pollando, Hungario, Aŭstrio, Bulgario, Nederlando, Italio, Belgio kaj aliaj landoj.

Sed la skriba komuniĝo jam iĝis nesufiĉa, dum „la fera kurteno“ levetiĝis kun granda peno.

En la 1983 jaro en Budapeŝto okazis la vica internacia kongreso de blindaj esperantistoj, sed „la kurteno“ eblis movi nur havante gastinvitilon, kiun sendis al mi la hungaraj amikoj.

² Alilandanoj imagis, ke geedzoj dormas sub unu litkovrilo. En Europo tio ne eblas. En Sovetunio tiuepoke mankis eksterlandaj veturoj, oni same mise komprenis la demandon. (Rim. de la korektinto)

...En la stacidomo min atendis la unua surprizo. Estis anoncita starto de la trajno Leningrado – Lvovo, koincidinta laŭtempe de la foriro de tiu al Budapeŝto. Kun amaso de akompanantoj mi jetis min sur kajon, kie estis nur unu sola lasta vagono ĝis Budapeŝto. La peza kurteno dume ne leviĝis por ĉiuj dezirantoj enrigardi tiufanken. En Lvovo oni anoncis, ke ĉi tie ni restos tri horojn, atendante la trajnon Moskvo – Budapeŝto, kun kiu estos kuplita nia vagono. Miaj laŭkupeaj najbaroj estis familio, pli frue loĝinta en Lvovo. La geedzoj kaj ilia dekjara filo petis permeson promeni tra la urbo, invitinte ankaŭ min. La okazon konatiĝi kun la antikva urbo, ne simila al la aliaj, situanta en pitoreska loko, mi ne povis rifuzi. Satvaginte laŭ la stratoj, ni kaŝiĝis de varmego en malnova kafejo preskaŭ tute enteriĝinta. Nur ĉe la plafono je mallarĝa strieto penetris internen taga lumo. En la ejo estis konservitaj meblaro kaj hejma ilaro de tiuj foraj jarcentoj. Sed la tempo rapidiĝis reveni al la stacidomo. La vagonaro, kunmetita el vagonoj de diversaj urboj kaj respublikoj, jam staris ĉe senhoma kajo, gardata de milico. Kontrolinte

niajn biletojn kaj pasportojn, oni permesis al ni pasi. Impetinte al vosto de la trajno, ni ne ekvidis nian vagonon. La terura penso, ke la trajno povas forveturi, instigis nin kuri laŭlonge de fermitaj vagonoj al komenco de la trajno, serĉante nur la ŝildon «Leningrado – Budapeŝto». Nia grupo el la dekjara knabo kiel ĉefo, sekve kurantaj liaj sportemaj gepatroj kaj mi, ŝvinganta novan blankan bastonon por blinduloj, tuj atentigis ĉiujn pasaĝerojn, amasiĝintajn ĉe malfermitaj fenestroj. Ĝiskurinte kapon de la trajno kaj ne trovinte nian vagonon, ni turnis al la vosto de la trajno, plirapidinte kaj jam pli atente legante la ŝildojn. La lasta vagono estis «Rigo – Budapeŝto». Turniĝinte je 180 gradoj, ni decidis trovi estron de la trajno kaj kun duobligita rapideco samkonsiste kaj en la sama ordo ekkuregis laŭlonge de la vagonaro, elvokinte eĉ pli grandan intereson al nia sporta teamo. Pasaĝeroj tondre salutis nin, dezirante venkon al la ĉefo, amike subtenante min: «Onjo! Streĉiĝu! Ne kapitulacu!» Kiam mi ŝvingetis al ili la blankan bastonon, ili aplaudis. Ni frapis la pordon de la unua vagono por inviti la estron, sed ne ricevis respondon. Malesperiĝinte, denove, la kvaran fojon ni ekkuris al fino de la trajno. Laŭ la plilaŭtiĝintaj salutoj kvanto de niaj spektantoj iĝis pli granda, la zelotoj skandis: «Ĉampionoj! Ĉampionoj!» Oni eĉ ĵetadis al ni kuraĝigajn premiojn. Sed ni kuris kaj kuris. Ni haltis, kiam malantaŭe eksonis miriĝitaj eksklamacioj de niaj vagonservistoj: «Haltu! Kienas vi?» Turninte malantaŭen, ni ekvidis niajn vagonservistojn ĉe la vagono. Ni apenaŭ sukcesis enkupeigi, kiam la trajno startis. Ni longe ne povis trankviliĝi kaj pro tio ne kapablis admiri Karpatojn. Post severa kontrolo ĉe la limo la vagono kun mallaŭtiĝintaj pasaĝeroj ekveturis al Budapeŝto. Mi eksentis, ke ie fore restis ĉio la plej kara, kaj mi ekdeziris hejmen. La humoro pliboniĝis, kiam mi trafis brakumojn de la geedzoj kaj ilia filino, kun kiu mi jam renkontiĝis en Leningrado, kie ŝi praktikis en kursoj pri la rusa lingvo. Antaŭ kaj post la kongreso mi gastis en tiu familio, kie la rusa kaj Esperanto ebligis al mi liberan komuniĝon. Priskribo de belega Budapeŝto postulas apartan rakonton. Mian admiregon elvokis magazenoj plenaj de varoj kaj precipe de teknikaĵoj. Mia maldika monujo rapide malpleniĝis: mono apenaŭ sufiĉis por suveniroj. Ŝanĝo de rubloj kontraŭ valuto de aliaj landoj en USSR estis rigore limigita kaj nekonsiderinde etsignifa.

Kaj jen mi estas inter kelkdekoj de nevidantoj, venintaj el ĉirkaŭ du dekoj da landoj de Eŭropo. Ĉi tie kolektiĝis blinduloj, pasiigitaj de la kredo je

estonto de la lingvo Esperanto, ardigitaj de la espero, ke ĝia simbolo – la verda stelo – estingiĝos neniam. Ĉiuj renkontiĝis, kvazaŭ ili jam delonge konus unu la alian. Mi travivis emociintajn momentojn premi la manojn de miaj korespondantoj. Apartan ĝojon mi spertis, kiam mi kelkfoje konversaciis kun la redaktoro de la pola gazeto. Ni eĉ rifuzis kelkajn ekskursojn kaj kune kun lia edzino sidis ĉe la tableto en surstrata kafejo. Sep tagoj inter saĝaj kaj kleraj homoj konvinkis min iĝi aktiva partoprenantino de la internacia blindula movado. Raportintoj sciigadis interesajn informojn, muzikistoj admirigis profesiule. Semajna lingva kurso profundigis mian lingvoposedon.

En Varsovio en la 1987 jaro la tutmonda esperantistaro festis centjariĝon de la lingvo. 303 nevidantoj el pli ol 20 landoj venis al la jubilea kongreso, kie regis plenaj unuanimeco, interkompreno kaj amikeco. La plejmulto de la partoprenantoj alveturis el kapitalismaj landoj. Sed ĉi tie homoj, kunigitaj per la lingvo kaj amikeco, kolektiĝis en la aparta lando. En la kongreso estis anoncigitaj rezultoj de la

Literatura konkurso «Mia vojo al Esperanto». Mi gajnis la unuan lokon, pri kio estis publikigite en la resuma kongresa raporto de la gazeto „Pola Stelo“.

La pli frua redaktoro de la gazeto jam forpasis. Lia vidvino akompanis min al lia tombo, al la tombo de la redaktoro, multe da jaroj gvidinta la plej popularan gazeton. Al ni aliĝis la nevidanta amiko kun la edzino el Aŭstrio. Metinte florojn, ni kvarope iom sidis ĉe la tombo... En la malnova varsovia juda tombejo partoprenantoj de la jubilea kongreso kliniĝis antaŭ la tombo de la kreinto de Esperanto. Post la kongreso invitite de mia amiko kaj lia edzino mi veturis por du semajnoj al la urbo Elblongo. Vojaĝoj kaj konatiĝo kun novaj homoj plivastigis miajn sciojn pri Pollando. Ni estis invititaj al nuptofesto, al parencoj de mia amiko, loĝantaj en vilaĝo. Tiel mi trafis al vilaĝa nuptofesto aranĝita laŭ malnovaj katolikaj ritoj. En preĝejo ne estis pastroj en frokoj, brilantaj je juvelŝtonoj, desur muroj ne rigardis sennombraj vizaĝoj de sanktuloj, forestis altaro kun pordego al paradizo. Antaŭ preĝantoj estis granda kruco sur pura blanka muro. Senbrilo kaj senpompo ne faris pli malgrava solenecon de la katolika geedziĝkronada rito. En plena silento, sidante sur lignaj benkoj, ĉeestantoj aŭskultis ĵuron de geedziĝantoj kaj dezirvortojn de la pastoro por longa geedza vivo de la juna paro. Ĉiuj en la preĝejo faris preĝon. Blanka robo de la fianĉino, sobra kostumo de la fianĉo kaj koraj deziroj de la pastoro plifortigis solenecon de la rito. La pastoro estis konata al mi. En la jubilea kongreso ni aŭskultis lian predikon en Esperanto.

Interesa kaj sciga estis vizito de la malbroka mezepoka kavalira kastelo, preskaŭ konserviĝinta netuŝite kun dikegaj netrabateblaj muroj, mallarĝaj altaj fenestroj, eksteraj enkortaj ŝtuparoj al la dua etaĝo. En loĝlokoj forestis fornoj. Sistema de la hejtado estis instablita en duonkelo. Varmo supreniĝis kaj tra poroza planko varmigis la duan etaĝon. Impresis portagmanĝa tablo, plene okupinta grandan ejon, enspacintan ĉirkaŭ ducent gastojn, kiuj sidis sur masivaj seĝoj kun altaj dikaj dorsapogiloj, verŝajne, defendantaj gastojn kontraŭ danĝeroj de malantaŭe. En la kastelo multas mallarĝaj senlarmaj koridoretoj, neatenditaj turnoj, senelirejoj. En unu el ili ni ekvidis rondan aperturon, kien fojfoje «falís» nedezirindaj gastoj por senspure malaperi. La ĉiĉerono montris antikvan ŝlosilon de la kastelo, unu el kvar, konserviĝintaj en la mondo...

Iom post iom vizitoj eksterlanden por rusianoj plisimpliĝis, sed burokratoj inventadis novajn obstaklojn.

En la 1988 jaro mi kun la nevino pretigis veturon al Nederlando. Tiam ĉiuj trajnbiletoj al fremdaj landoj estis vendataj nur en la centra kaso de Moskvo. En Leningrado oni akceptis nian mendon kaj pagon, doninte kvitancon kun mendonumero. La tempo estis pasanta, sed la biletojn oni ne sendis. Mi ekmemoris, ke oficistino, akceptinta la mendon, tre skrupule foliumis niajn pasportojn, kvazaŭ serĉante ion. Kompetentaj homoj flustris al ni, ke en pasporton necesus meti «alpagon», tial la biletojn ni ne ricevos. Ni veturis al Moskvo kaj vere, nia mendo ne estis plenumita. La biletojn, tamen, ni ricevis.

Ankoraŭ dum vizo-obteno al Nederlando ni trafis kuriozan situacion. Por obteni vizon necesas turni sin al ambasadejo de vizitota lando. Funkciojn de la ambasadejo de Nederlando plenumis tiu de Israelo en Moskvo. Apud la ambasadejo amasiĝis centoj da homoj, venintaj el la tuta Sovetunio obteni vizon por konstanta loĝado en Israelo. Apud la porto staris homo kun listo, lau kiu oni enlasis enen. Ni klarigis, ke ni ne veturas al Israelo, sed oni ne aŭdis nin. Homoj ĉi tie «loĝis» dum monatoj. Malfermiĝis pordo, oficisto proponis plenigi demandarojn. Ĝoĝiĝinte, ankaŭ ni plenigis tion, sed kiam ni atente traleĝis ĝian enhavon, evidentiĝis, ke ni petis konstantan loĝlokon en Israelo. Ĉirkaŭirinte la konstruaĵon, ni trovis elirejon kaj du milicianojn, kiuj savis nin de elmigro.

Mirinda Nederlando, la bonege organizita kongreso lasis fabelan impreson. Dum tri semajnoj de gastado en la familio de nevidantaj amikoj ni vizitis ne nur ĉiujn grandajn urbojn, sed ankaŭ vilaĝojn, pri kio mi rakontis aparte. Ravan impreson pri restado en Nederlando ne malbonigis aventuroj dum la forveturo. Lastan tagon ekfuriozis granda fulmotondro, rompinta fervojan konekton kun la urbo Utreĥto, kie ni devus kapti moskvan trajnon. Helpis vidantaj esperantistoj, ĝustatempe veturigintaj nin per sia aŭto al la trajno. Kiam venis la kunmetita vagonaro, en moskvaj vagonoj mankis liberaj lokoj kaj ni estis sidigitaj en la varsovian. En la kongreso polaj amikoj donis al ni por ajna okazo kelkajn milojn da zlotoj kaj adresojn de varsoviaj blinduloj. Post starto el Utreĥto polaj vagonservistoj sciigis nin, ke ĉe la limo inter Nederlando kaj Germanio nia vagono estos dekuplita. Mi kuris tra vagonoj ĝis la moskva, kie dume estis du neokupitaj lokoj, rezervitaj en la germana urbo Aaĥeno. Glor'al Dio! Pasageroj ne venis. Nia vagono jam estis dekuplata, sed polaj vagonservistoj ĝustatempe enigis nin en la moskvan vagonon kaj ni sukcesis fordoni al ili polan valuton.

Post disfalo de USSR rusianoj aktive ekvojaĝis eksterlanden. Mi kun la filo veturis al la kongreso en Vieno kun halto en Budapeŝto por gastari en la familio de amikoj. Ĉi foje mi partoprenis la Universalan Kongreson, kie ĉeestis 2500 esperantistoj el 66 landoj, eĉ el afrikaj. En randa kvartalo de Vieno situas muzeo de historio de Esperanto-movado. Grandan lokon tie okupas ekspozitaĵoj, rakontantaj pri la tutmonda blindula movado. Mi kontribuis de la nomo de mia urbo, enmaniginte al laborantoj de la muzeo diskon kun registritaj paroladoj de leningradanoj. Mi ne povas ne rakonti pri la antikva urbo Melko ĉe elfluo de Danubo, kie troviĝas unusola en la mondo biblioteko de biblio en ĉiuj lingvoj, eĉ en Esperanto. Reen ni navigis laŭ Danubo ĝis Vieno per antikva ŝipo, plenigita de esperantistoj el Eŭropo, Aŭstralio, Ameriko, Japanio, Ĉinio.

El Vieno ni ekis al Budapeŝto, sed laŭvoje al la stacidomo misvojis kaj malfruis al la trajno. Ĉe kajo staris kurta vagonaro. Ni turnis nin al fervojisto,

klarigante, ke ni devas veturi al Budapeŝto. Li montris la trajnon. Ni sukcesis ensalti en la vagonon kaj ekveturis. Post kelkaj horoj la trajno haltis kaj ĉiuj pasaĝeroj lasis la vagonon. La filo ekvidis malantaŭ fenestro limgardistojn. Ni eliris kaj nia trajno tuj ekveturis rean vojon. Estis varmege. Ni eksidis sur longan benkon. La filon aliris aŭstra limgardisto, kontrolis liajn dokumentojn kaj foriris. Ni mirigite retrorigardis kaj la filo ekridis : li sidis en teritorio de Aŭstrio, mi – en tiu de Hungario. Ni volis trinki. Sergio iris kun botelo akiri akvon. Reveninte, li kun miro rakontis, ke trovis sovetian metalan cisterneton kun surskribo « trinkakvo» kaj kun kruĉo je ĉeneto. Sensoifĝinte el nia kara fonto, ni gajiĝis. Nun nin aliris limgardistoj de ambaŭ landoj, la hungaro demandis ruse : « Kien vi iras , bubo?» Poste la konversacio daŭris kun uzo de unuopaj rusaj, germanaj, hungaraj vortoj kaj ankaŭ de gestoj kaj mimiko. Pene venkinte la lingvan barieron, ni komprenis, ke trajno ĝis Budapeŝto venos. La kajon aliris vagonaro el novaj belaj vagonoj, havantaj apartajn kupeojn kun molaj divanoj. Oportune instaliginte , ni komencis trankviliĝi, sed frue. En la kupeo aperis kontrolistoj. Ili komencis ion al ni klarigi, sed ni senhelpe rigardis ilin. Tiam ili enmanigis al ni folieton, kie estis skribite «+580». Ili postulis alpagon. Ni arde komencis klarigi, ke ni aĉetis la biletojn en Rusio kontraŭ dolaroj kaj nun ni havas nek forintojn, nek ŝilingojn, nek dolarojn. Ili finaŭskultis nian pasian dueton kaj silente foriĝis. Poste ni eksciis, ke per niaj biletoj ni rajtis veturi en elektrotrajno, sed ni eksidis en trajnon de la unua klaso. Plifortiĝinte per antaŭvide rezervitaj bongustajoj de «sveda tablo», sinjorece instalinte nin sur molaj divanoj, ni dormetis ĝis Budapeŝto...

Ĉe disfalo de Soveta Unio pretigo de vizoj eksterlanden plisimpliĝis, sed oficistoj dum malfacilaj naŭdekaj jaroj utiligis la situacion por «varmigi la manon». Vojaĝo al Aŭstrio estis ekskluzive interesa, sed ankaŭ la plej aventura.

Pretiginte dokumentojn por veturo al Aŭstrio, ni aĉetis la biletojn jam en specialaj kasoĵ de Peterburgo. Feliĉaj ni prenis ĉe kasistino stakon de dokumentoj kaj biletojn en formo de libretoj kaj ne kontrolinte, metis ĉion en tablokeston. Kelkajn tagojn antaŭ forveturo ni eligis la dokumentojn kaj ekvidis, ke mia pasporto mankas. Traserĉinte la apartamenton, plorpleniginte sitelon per larmoj, ni impetis en vizofakon, kie oni konsideris miajn multfojajn veturojn kaj faris por mi novan pasporton. En vico en kason por aĉeti biletojn ĝis Moskvo kaj en la ambasadejo de Aŭstrio denove fari la vizon venis simpla penso supreniĝi en la duan etaĝon al eksterlandaj kasoĵ. Administrantino redonis mian pasporton, kiun ŝi ricevis de kasisto el alia skipo. En malicaj naŭdekaj jaroĵ homoj akiradis monon kiu kiel kapablis. Laŭ radio kaj en ĵurnaloĵ oni publikigis anoncojn pri perdo de vojaĝpasportoj kun peto revenigi ilin kontraŭ rekompenco. Kasistoj, utiligante fidemon de homoj, tiamaniere «perlaboradis» monon. Laŭ opinio de oficistoj se homo vojaĝas eksterlanden, oni rajtas malplenigi lian monujon.

Ankaŭ limgardistoj ne konfuziĝis. Kiam ni veturis al la kongreso en Berlinon, en Grodno* (Belorusio, rim. de la provleganto) niaĵ karaj limgardistoj kontrolis miajn dokumentojn kaj biletojn, tiujn de mia bofilino kaj ŝia dekonujara filo. Al mi oni revenigis ĉion sed pasporton de Olga oni longe foliumis kaj proponis al ŝi iri kun ili. La tempo estis pasanta, ni kun Maksimo (la nepo) ekmaltrankviliĝis. Mi trovis larmantan Olga-n. Ne ĝenante sin ĉe du vagonservistoj , limgardistoj postulis de Olga valuton, accertante, ke ŝi veturigas la filon al Germanio por vendado. Tiuj idiotoj havis potencon. Prezertinte tri reajn

biletajn, ni revenis en la kupeon. Lime kun Germanio poloj kaj germanoj nur rigardetis niajn dokumentojn.

Niaj landlimaj malagrabloj estis rekompencitaj de la rimarkinde organizita kongreso en la hotelo en al ĉefa strato de Berlino Unter-den-Linden (Sub tilioj) nemalproksime de Brandenburga Pordego kaj Rejhstago. Vespere post fino de la programoj ni kolektadis grupon de nevidantoj kaj iris al la Placo de Respublikoj, kie surtegmente de Rejhstago sub vitra kupolo estis granda panoramplaceto. En ĝia centro staris ringokukecaspekta larĝa benko, sur kiun eblis kuŝiĝi kaj admiri stelan ĉielon kaj dealte de la tegmento bonege ĉirkaŭrigardeblis centro de Berlino. Mi memorfiksis la ekskurson al Potsdamo, al posedaĵoj de Frederiko la II-a. Mi ĝis nun vidas en la angulo de lia kabiteto fotelon, en kiu li mortis kaj lian tombon piede de la ŝtuparo.

Ne eblas forgesi la negrandan ruĝbrikan konstruaĵon, kie la 8-an de majo en la 1945 jaro estis subskribita akto pri kapitulaco de la faŝista Germanio.

Kvankam necesis travivi kaj venki malagrablojn kaj obstaklojn, mi kun ĝojo rememoras miajn vojaĝojn al Eŭropo, kien min alkondukis la internacia lingvo Esperanto. Domaĝe, ke akceptita en la 1956 jaro decido de UNESCO pri agnosko de Esperanto kiel la sesa laborlingvo estis forgesita. Sed multaj homoj en nia planedo ne permesos estingiĝon de la verda stelo – la simbolo de amikeco kaj paco.

30/04/2020

Sankt-Peterburgo

*Tradukis Klara Ilutoviĉ (u. Elektroŝtal)
Provlegis, korektis S.Smetanina (Moskvo)*

Interrompita infanaĝo

Antaŭparolo

Mia rakonto “Interrompita infanaĝo” estis publikigita en la gazeto “Школьный вестник” (“Lerneja heroldo”) № 6, 7 de 2019 j. en la eldonejo “Молодая гвардия” (“Juna gvardio”). Post kelkaj monatoj al mi telefonis la nevidanta legantino el u. Kursko Jeroĥina Tamara Vladimirovna kaj rakontis, ke ekde 1954 jaro la lipecka prezidanto de la provinca fako de TSB (Tuntunia societo de blinduloj) estis Anipkin Miĥail Nikitoviĉ, estinta partizano en Pskova gubernio. Mi “ekkuris” al interreto. Duboj ne restis. Denove mense travivinte tiujn terurajn jarojn, sceneron post scenero ririgardante mian kvarjaran seriaron, mi revivigis en mia memoro multon, kion mi en la publikigita teksto nur menciis. Psikologie en la naŭdekjara aĝo por mi malfacilas renovigi bildojn de tiuj jaroj, sed ne rakonti pri ili mi ne povas.

La aŭtoro

Vivo en okupacio

Fine de majo 1941 j. ĉesis lecionoj en lernejo, mi iĝis triaklasanino, kaj en la solena vesperkunveno pro la plej bona lernado oni enmanigis al mi honorfolion kaj donacojn, inter kiuj la plej ĉefa por mi estis ilo por skribado por blinduloj. En inversa flanko de mia brajla ilo estis gravuraĵo: «Al la plej bona

lernantino Andrejeva Tamara. Instituto de blindaj infanoj. Leningrado, 1941.» Nia lernejo nomiĝis instituto, kiel en la 19-a jarcento, ekde ĝia fondo. La skribilo estis tiom kara por mi, ke eĉ nokte mi gardis ĝin subkusene. Tiamaj brajlaj iloj estis sufiĉe pezaj, havis 18 liniojn, en ĉiu po 24 ĉeloj. Plifacilitaj iloj, kiel la nunaj, ankoraŭ ne estis produktataj.

Por someraj ferioj ni kun la panjo forveturis al la Pskova provinco en vilaĝon al la avino. Ŝia domo troviĝis iom flanke de la najbaroj, apud lago, en luksa frukta ĝardeno. Nin atendis paradiza vivo inter aromantaj kampaj floroj kaj diversvoĉaj birdoj. Al ni aliĝis mia onklino kun la dekunujara filino Nina. Kia ĝuiga ripozo post urba tumulto estas baniĝo en diafana varma akvo de la lago! Ni kun Nina frumatene elkuradis el la domo kaj fojfoje eĉ forgesadis reveni por tagmanĝo, satmanĝinte bonodorajn fragetojn!

La nigra tago de junio detruis ĉion. Viroj foriris al fronto. En vilaĝo restis maljunuloj, virinoj, infanoj, handikapuloj. Invadintoj tre baldaŭ okupis nian loĝlokon. Foje tage per aŭtoj, motorcikloj, bicikloj ili traveturegis preter fenestroj sen eĉ unu pafu. Tiel ni trafis en arieron de la malamiko. Kiel ni vivu nun? Kio estos al ni? Eĉ ne unu demando havis respondon.

Laŭ vilaĝoj vagis ruĝarmeanoj, malantaŭiĝintaj de siaj trupoj. Vilaĝanoj nutris, vestis, kaŝis ilin. Ruĝarmeanoj unuiĝis, organizante grupojn de la rezistado. Tiel estis formataj partizanaj taĉmentoj, kiuj poste kruele batalis kontraŭ invadintoj. Sed la malamiko estis armita kaj senkompata, ekzekutante la paman loĝantaron aparte feroce. Tial loĝantoj aktive helpadis partizanojn. Kaj se germanoj suspektis vilaĝanojn esti ligitaj kun partizanoj, ili forbruligis tutan vilaĝon kune kun homoj.

Du kilometrojn for de ni situis la vilaĝo Stega. Ni iĝis atestantoj de la mezepoka sovaĝeco: la loĝantoj estis kunkeligitaj en kolhozan brutojn kaj bruligitaj. Ni aŭdis korŝirajn kriojn de brulantaj vivaj homoj. Kiam ni venis al la cindrejo, la vilaĝo estis malplena. Nur en unu domo surtable staris ĉerko kun mortinta maljunulo – la ununura atestanto de pereo de samvilaĝanoj. Loĝantoj de ĉirkaŭaj vilaĝoj kuniĝis, elfosis komunan tombon kaj enterigis la maljunulon kune kun cindro de liaj najbaroj kaj parencoj.

Kvar kilometrojn for de nia vilaĝo kuŝis fervojo «Leningrado – Kievo», malantaŭ kiu sterniĝis arbaroj kaj marĉoj. Ĝuste tie kolektiĝis rezistanoj kaj formiĝis partizanaj taĉmentoj. Ĉi flanke de la fervojo troviĝis lokaj loĝantoj kaj regis germanoj, aliflanke estis teritorio de partizanoj. Ili ofte sabotis ariere de la malamiko, neniigante la teknikon, bruligante kazernojn kun soldatoj. Kiel regulo, partizanoj agis nokte, matene ili revenadis arbaron, por tio ili bezonis transiri la fervojon, intense gardatan. Tial tage partizanoj kaŝiĝis ĉe pacaj loĝantoj. Tia tagrifugejo estis la domo de la avino kun kvin virinoj.

Venis aŭtuno. Ni pretigis rezervojn de nutraĵoj por vintro: ni kolektadis legomojn en legomĝardeno, fermentigis brasikon, peklis kukumojn, kuiris konfitaĵon, utiliginte restintan sukron, sekigis fruktojn. Ni laboris de mateno ĝis vespero. Mi ne rimarkis, kiel sur miaj manoj aperis blazoj. Iia kvanto rapide pligrandiĝis. Ili maturiĝis kaj krevis, surverŝante la manojn per nigra puso, kun jukado kaj doloro. Alta temperaturo pliturmentigis mian staton. Mankis kuracistoj kaj kuraciloj. Tizanoj kaj herbaj infuzaĵoj de la avino ne helpis kaj ne povis mildigi miajn suferojn.

Foje oni nelaŭte frapis al la pordo, kaj eniris tri germanoj kaj unu civilvestito, kiu salutis nin en la rusa kaj petis en la nomo de la germanoj uzi nian tablon, ĉar tagmanĝi en aŭto estis maloportune. Ili demetis la supervestojn, lavis la manojn, sur la tablon metis belajn paperajn tukojn kaj komencis manĝi. En la ĉambro ekodoris per diversaj manĝaĵoj, precipe je viandaj konservaĵoj. Eĉ kato aperis kaj eksidis meze de la ĉambro. Unu el la germanoj ĵetis al li pecon de kolbaso, kaj la kato tuj malaperis.

La avino, la panjo, la onklino kaj Nina sidis rande de mia lito, kovrinte min per siaj korpoj. La germanoj mallaŭte interparolis. La interpretisto aliris nin kaj donis al Nina briketon de ĉokolado. Kaj jen li ekvidis min.

- Ĉu la knabino malsanas? Je kio?

- Ŝiaj manetoj putras, kuraciloj mankas, – respondis la avino.

La interpretisto revenis al la germanoj. Ili jam pretigis sin por foriri. Sed aŭskultinte la interpretiston, la aĝa germano demetis la superveston kaj aliris min. «Ne timu, li estas kuracisto!» – diris la interpretisto. Ekvidinte miajn manojn, la kuracisto movetis la kapon kaj ekiris lavi siajn manojn. La dua elektadis kuracilojn en la speciala sako. Ili faris al mi kelkajn injektojn, forigis puson, tralavis la manojn, donis kelkajn tablojdojn. Helpe de la interpretisto oni klarigis al la panjo, kion fari.

Kiam mi vekiĝis, la germanoj jam forestis. Al mi iĝis pli facile. Post du tagoj denove venis la kuracisto kaj la interpretisto. Observinte la resaniĝantajn manojn, la kuracisto ekridetis kaj diris: «Gut!» Li denove faris multe da proceduroj, lasis kuracilojn, el kiuj mi memorfiksis gudran ŝmiradon, ĝi havis abomenan odoron. Adiaŭante, la doktoro donis al mi grandan briketon de ĉokolado. La avino proponis al li korbeton de ovoĵo. Sed li respondis: «Nein!». Kaj foriris.

- Panjo, mi kaj li estas malamikoj. Kial li kuracis min?

- Li estas kuracisto kaj plenumis ĵuron de Hipokrato.

Unu tago

....La unua milita vintro evidentiĝis frostega. La panjo kaj la avino daŭre aktive helpis al partizanoj: ili bakis panon, pretigis nutraĵojn, kudris kamuflosurtutojn. La najbaroj volonte alportadis littukojn, kusentegilojn, viŝtukojn por iel helpi.

Foje fruan januaran frostan matenon aŭdiĝis mallaŭta frapo al la pordo. Eniris la unuaj gastoj. Ili estis tri partizanoj jam konataj al ni. La ĉefo de la grupo Miŝa Anipkin el la urbo Velikije Luki, fortika, sana bubo, tre bonrezona kun saĝaj okuloj, rapide taksantaj la situacion. La dua – la tataro Zaĥar Gajanov, eksplodema kaj neretenema, preta tuj uzi la pugnojn, «ĉiujn pafmortigi», neniigi malamikojn. La tria – la ukraino Ŝurko Kloĉko, distingiganta per la suda temperamento, obstineco kaj furioza malamego al la malamiko. Tiutage ili estis la unuaj gastoj.

La virinoj ektumultis. La elirantaj el frostoj partizanoj laciĝis kaj ekmalsatis, al ili estis gastame donitaj rifuĝo kaj varmo. Mia panjo, la urba loĝantino, spertiĝis pri memfarita alkoholaĵo. Ŝi opiniis, ke la unua glaseto efikas al frostiĝinta homo pli bone ol kuracilo, forigante lacon, varmigante, revenigante guston pri la vivo. La panjo ne sciis receptojn de alkoholfarado, ne posedis ĝian teknologion, sed la rusa konjektado, intuicio ne embarasis ŝin. Sur la tablo aperis

botelo flavmalhela likvaĵo. Mi ne sciis la guston kaj odoron de tiu likvaĵo, sed ĝi estis altgrada. Tiun ĉi specon de vodko la panjo nomis «portabla vino». Mi opinias, ke glutinte ĝin, homo rapidas postmanĝi. Post la unua glaseto niaj gastoj ruĝiĝis, forlogiĝis interparole, ekŝutis ŝercojn. Sed malfeliĉo atendis ĉe la sojlo.

La avino staris ĉe fenestro kaj observis la vojon. Subite ŝi ojis kaj eksidis. Ĉiuj enrigardis la fenestron kaj ekvidis malaltan larĝan sensidlokkan sledon, veturigitan de koĉero. Kaj malantaŭ lia dorso, efekte etendinte sin, sidis la pareto – virino kaj germano. La paŭzo estis nelonga, ĉar ĉiuj tuj reagis: oni malfermis lukon en la kelon kaj la partizanojn simple puŝegis tien. Ili falis kiel sakoj. La luko estis fermita, fermoplato kovrita per tapiŝeto. Ĝustatempe!

Senfrape malfermiĝis la enirpordo. Eniris la germano kaj la rusa virino, kiu evidentiĝis la iama lerneja amikino de la panjo. Ŝi venis por montri sian novan kavaliron kaj aspektis tre memkontenta, pepis, konatigante nin kun la germano, kiu silentis kaj atente ĉirkaŭrigardis. La mastriĝo varme akceptis novajn gastojn. Ili kovris la tablon per la freŝa tablotuko, eligis porfestan teleraron. Vidante al si tian atenton la germano malstreĉiĝis kaj lia amikino Nadja lumis. Sed ni aŭdis, ke sube ne estis trankvile kaj timis, ke bruo atentigos la pareton.

La triopo, falinta en la malluman kelon, disrampis laŭ la terplanko, plenigita je bareloj, korboj, kestoj, sakoj. Zaĥar batis la kapon kontraŭ barelo, Miŝa ĝisrampis terpomamason kaj terpomoj ekruĝiĝis diversflanken, Ŝurko trafis en bovleton kun -faruno. Desupre obtuze aŭdiĝis voĉoj. Aŭdinte la vorton «fritz³», Zaĥar kvazaŭ deĉeniĝis kaj ĵetis sin ĉe alstarigitan ŝtuparon. Liaj kamaradoj apenaŭ sukcesis detiri lin je la kruroj. Sed li rezistis, insultis. «Vi estas perfiduloj, – li siblis.– Super viaj kapoj promenas faŝistoj, sed vi, kiel ratoj, kaŝiĝis! Mi murdu lin!» Dispuŝinte la amikojn, li saltleviĝis. «Ne krii!» – konvinkadis lin la kamaradoj. – «Mi estas en mia hejmo!»... Por trankviligi Ŝurko mergis lin per la kapo en la barelon kun peklitaj kukumoj. Miŝa brakumis malsekan Zaĥar-on. «Vi murdos la germanon, lian serviston, kaj amikino, enterigos ilin, sed oni ja serĉos ilin! Iu sciis, kien ili veturis! Kaj kio estos al la virinoj, al du knabinoj?!» – «Ni forveturigos ilin arbaren!» – «Kaj ĉu ankaŭ loĝantojn de la vilaĝo en arbaron!? Por fungoj – beroj?!»

Zaĥar silentiĝis, imaginte kiel gestapanoj torturas du knabinojn, rememore pri sia trijara filo.

Por surdigi bruon en la kelo, ni supre komencis paroli pli laŭte, movi taburetojn, benkojn. La germano silentis, ĉar li ne komprenis en la rusa, kaj la mastriĝo surtabligis regalajojn. Kiam surtable aperis la botelo kun glasoj, la germano ekridetis antaŭĝue. Aperis ne la sama botelo, el kiu trinkis partizanoj, sed bela bluglasa karafo, kun figura korko. La panjo nomis tiun specon de alkoholaĵo «konjako». Fritz definitive alutimiĝis, ekmankklakis kaj ekkriis :»Gut! Gut, matka! Jajko! Vodka!» Al la pareto estis alverŝata t.n. konjako, proponataj hejmaj manĝetoj. Pro tiom bongustaj regalajoj kaj gradoj de firmaĵo de la panjo la gajeco pliintensiĝadis, kio evidente ekscitis senhelpajn partizanojn, sidantajn en la kelo. La avino flustris al Nina kaj mi: „Dancu, piedbatu pli forte!“ Nia dancado ne bruegis, ni surhavis feltbotojn. Ni deĵetis ilin,

³ La vorto «fritz» estis moknomo por germanoj, eble devenanta de la persona nomo Fritz. Noto de provleganto

nur la piedoj ekdoloris. La panjo diris : «Kantu!» Plenvoĉe ni ekkantis :» Vintre abieto suferas pro malvarm'...». Ni finkantis, sed el la kelo ĉiam ankoraŭ aŭdiĝis bruo. Kaj la avino laŭte ekkantis «Sur avinaj teroj gajis du anseroj ...». Ĉiuj kunkantis, sed forgesis la duan strofon kaj daŭrigis je «la-la-la». Fritz ekĝojis kaj ankaŭ li komencis kanti «la-la-la» per sia profunda baso, manklakante kaj piedbatante. La tuta domo ekskuigegis. Kiam supre ekkantis fritz, Zahar eksplodis denove, frapis vizaĝon de Miŝa. Zahar estis ligita. Sed li ĉe tio sukcesis mordi Ŝurko-n. Lia buŝo estis korkŝtopita.

Subite ĉio interrompiĝis : ĉe la sojlo aperis la servosoldato. Li diris ion al la germano, tiu ekmaltrankvilis kaj ekis haste prepariĝi por foriri. Lia damo klarigis al ni, ke li ricevis urĝan ordontaskon. Ni helpis al li vestiĝi kaj la avino proponis al fritz la lastan antaŭforiran «apogbastonan»* glaseton. (*En Rusio en antaŭaj tempoj oni multe vagadis piede, apogante sin je bastono. Al tiuj pilgrimantoj en gastodomoj antaŭ nova longa vojo estis proponata glaseto «na posoŝok», por ke la vojo estu glata, facila, sen obstakloj. La apogbastono nomiĝis «posoĥ». De tie devenas la nomo de la lasta drinkaĵeto. Rim . de la provleganto). Kion tio signifis, li ne sciis. Sed ekvidinte belan bluvitrان karafon, li eltrinkis ankoraŭ glason sen postmanĝi. Forirante, li afable basis al ni : «Matka! Jajko! Gut Vodka! La-la-la!» Kaj kun tiu sloganoj la pareto elfalis al frosto.La sledo forveturis kaj ni ridiĝis en la muta sceno el la teatraĵo «Revizoro».

Nin revenigis al realeco la gastoj nova unu – partizanoj frapis en plankon. Ni malfermis lukoplaton kaj ili aperis de tie unu post la alia. Ili aspektis tre ekzotike : kovritaj per fojno, plumoj, koto kaj aldone malsekaj. Rigardi ilin sen rido ne eblis : duonvizaĝon de Miŝa ornamis malhelblua ekimozo, la frunto estis liniita per ruĝaj strietoj. Ŝurko tenis sin je maldekstra ŝultro, la mano estis mordita ĝis sango. Zahar aspektis kiel klaŭno sur cirka areno. Ial li estis malseka, odoris je kukuma peklakvo. Pro algluiĝintaj pecetoj de petroselo, ajlo

kaj ceteraj verdaĵoj vizaĝo de Zahar prezentis artverkon. Kronis la bildon granda peklita kukumo, komferte instaliginta ĉe la kolumo. La virinoj rapidis purigi vundojn, uzante por desinfektado la saman portablan vinon. La buboj estis hirtigitaj, koleraj unu kontraŭ la alia. Zahar plendis :» Ili volis dronigi min en la barelo kun kukumoj! Ligis miajn brakojn! Kaj poste enbuŝigis ian fetoran ŝtopilon!» Ŝurko oponis :»Rigardu, kiel vi mordegis min! La tuta mano en viaj dentaĉoj!». – «Vi rigardu, kion vi faris al mia vizaĝo, kiel vi gratis ĝin!» – diris Anipkin. – «Bone, knaboj, hejme ni solvos tion, Nun tempas foriri, dum mallumas», – konkludis li , kiel prudenta homo.

La virinoj alivestis partizanojn, envolvis ilin en kamuflosurtutojn, donis nutraĵojn por vojo kaj adiaŭis la gastojn numero unu. Restinte sen ili, ni estis longe rekonsciiĝantaj. Tiu ĉi unu neordinara tago memorfiksiĝis al mi por la tuta vivo.

Savilo

Vintro tiujare estis frosta, neĝa. Januare tagoj estis kurtaj, mornaj. Por lumigo en domoj oni uzis kenon, kiel en antikvaj tempoj en Rusio. Tian mornan matenon en la vilaĝon venis germanoj kaj policianoj.Ili disŝutiĝis laŭvilaĝe, enpelis homojn en domojn, ĉe ĉiu domo starigis policanon. Ni provis informiĝi ĉe gardinto, kio al ni okazos. Sed la duonebria perfidulo nur mallice rikanis kaj, ĝuante sian potencon, ripetadis :» Vi ekscios! Baldaŭ vi scios!» Ni konjektis, ke

faŝistoj atendas specialan puntaĉmenton, kiu havis rajton bruligi vilaĝojn kun homoj. Ankaŭ en tio germanoj havis ordon. Ni atendis nenion bonan, sed nesciado turmentis nin. La panjo verŝis glason da vodko al la gardinto kaj lia lango liberiĝis. Li fanfaroneme eldiris : «Jen, tuj venos fakuloj kaj rostos vin!» . Ne sciante por kio, ni vestiĝis pli varme. Simple necesis ion fari por ne pensi pri estonto. La panjo persvadis min lasi la ilon por skribado, sed mi ne konsentis, alpremante ĝin al la brusto. La ilo estis ligita per varma tuko al mia brusto. Ni vestis nin per pluraj jaketoj, bluzetoj, palto. Ni ne ploris, sed interbrakumadis kaj kisis unu la alian. Timo forestis. Interne ĉio mutiĝis kaj ridiĝis, konscio pri la realo malaperis. Ni spiris, sed estis jam mortintaj.

La atendado estis netolerebla. Mallumiĝis, sed punistoj ĝis nun ne aperis. Frosto plifortiĝis. Subite oni ordonis al ni forlasi la domon kaj bruligi ĝin. Ni trovis nin en infero : ĉio flamis. Fajro furiozis, diŝetante brulantajn trabojn, elŝirante

ilin el muroj de konstruaĵoj. Brulŝtipetoj flugis super la vilaĝo kaj, falante, eksplodis, rompiĝante je pecetoj. Vento deŝiris pajlajn tegmentojn, kaj ili kiel torĉoj aperis en diversaj lokoj, surteriĝis, estigante ĉiam novajn lignofajrojn. En brutejoj senhelpaj animaloj, penante saviĝi, batiĝadis kontraŭ muroj en korsiraj krioj de malesperiĝo. Ekis deziro kuri al ili, sed helpi ilin ne plu eblis. La animaloj estis pereantaj en teruraj turmentoj. Pro kio?

Ni estis forveturigataj al nenieno. Malantaŭ sledo kuris fidelaj amantaj kaj amataj Tuzik-oj, Murk-oj, Ĵuĉk-oj, Vasjk-oj, Ŝarik-oj* (* nomoj de hejmaj hundoj kaj katoj. Rim. de la provleganto) kaj ankoraŭ dekoj da kvarpieduloj. Disrtiĝante faŝistoj pafmortigadis ilin. Survoje restis iliaj kadavroj, kovritaj per mortotukoj el pura neĝo. Pro kio?

Ni estis forveturigataj al nenieno.

Ni enveturis iun vilaĝon. La sledo haltis, iu mortis. Akompanintaj nin gardintoj delogiĝis, ne atentante nin. Al la vojo rekte rigardis perono de domo. Abrupte la panjo kaptis min je mano kaj eniĝis en la domon, kie virino pretiĝis tablon por vespermanĝo. Ekvidinte nin , ŝi ektimis kaj histerie ekkriis :» Iru for! Mi ne volas morti pro vi!» Ambaŭmane ŝi puŝis nin al la malantaŭa korto kaj deĵetis desur alta perono al brutejo en profundan neĝdunon. Ni kuŝis en neĝo, tremante pro timo, malvarmo kaj senelireco, aŭdante maloftajn pafojn. Kuri ien senutilis, kaŝiĝi eblis nenie. Sed necesis strebi serĉi eliron.

Ni trafis iun konstruaĵeton. Tra malfermita pordo odoris je fojno. Ĝuste en tiu duonruiniĝinta fojnejo ni kaŝiĝis. La panjo kuŝigis min dorse al la malantaŭa muro, surĵetinte min per fojno. Mem ŝi enfojniĝis en alia loko. Finfine la grupo kun kaptitoj foriris. Pafado ĉesis, ekis relativa silento. En la domo, de kie oni nin tiel «afable» elĵetis, vespermanĝis germanoj. Baldaŭ ni aŭdis knaron de neĝo : al la tenejeto proksimiĝis duopo, haltis ĉe enirejo.

Kaj subite mi sentis fortan puŝon en la bruston, poste ankoraŭ eĉ pli gravan. Malantaŭ la dorso ekkrakis tabuloj. Al mi ŝajnis, ke mi suprenflugis kune kun la tenejo. Mi ne memoras, ĉu mi perdis konscion, sed iom poste aŭdis foriĝantajn paŝojn de germanoj. Ni nun kun la panjo silentis : ĉiu el ni timis ekparoli la unua por ne ricevi respondan silenton. La panjo finfine ne eltenis : «Filinjo...Tomenjo!» – «Panjo...» – flustris mi responde. Do, mi restis viva : Vojon al bajoneto baris la metala brajla ilo por skribado de nevidantoj. Pli poste en la vestaĵo surnivele de la brusto ni trovis du truojn. Ni denove enfojniĝis,

varmigante unu la alian. Evidente mi ekdormis. «Ĉit!Ĉit!» – flustris la panjo al mi. –» Mi estas kun vi! Ni pensos kaj trovos solvon!» Duonsvene mi konvulsis en ŝia brakumo, tra larmoj ripetante : «Mi timas! Ĝi atingos min! Mi forbrulas! Mi sentas, kiel fajra monstro kaptas min! Al mi estas varmege!» Tiu ĉi koŝmara sonĝo persekutis min dum multaj jaroj, kiel Scarlett-on el „Forportitaj de vento“. Kun tempo ankaŭ tio pasis.

La milito dividis mian vivon je feliĉa «antaŭ» kaj malfacila «poste». Tial mi ne ŝatas legi librojn kaj spekti filmojn pri milito.

La tenejo kaj fojno estis je nia kun la panjo dispono, kaj antaŭe nin atendis morto pro frostoj, malsato, soifo, kugloj de malamiko. Endas serĉi eliron. Kiam en la vilaĝo iĝis pli kviete, ĉararo kun kaptitoj forveturis, ni komencis serĉi helpon ĉe homoj. Irante preter iu domo, ni aŭdis infanan ridon kaj decidis frapi al ĝuste tiu pordo. Malfermis virino kaj sen demandoj enlasis nin. En la domo estis varme, bonguste odoris je freŝa pano. Kun intereso observis nin kvar infanoj.

La plej aĝa Vanja havis ne pli ol 12 jarojn. La mastrino Klava komandis helpi al ni senvestiĝi kaj lavi nin. Vanja ekis aferece disdoni instrukciojn al la gefratoj kaj tiuj plenumadis ĉion sen kontraŭi. Kiam oni demetis nian superveston, Vanja ekvidis sur mia brusto ilon por skribado de blinduloj kaj ekmiris : «Ho! Kio tio estas ĉe vi? Ĉu kavalira kiraso?» Mi klarigis al la knabo, ke tio estas ilo por skribo de blinduloj, kaj hodiaŭ ĝi savis mian vivon. «Vi ŝercas! Du feraj platoj kun truetoj, iaj punktoj rande de unu folio. Ĉu eblas ion skribi?» – «Donu paperfolieton kaj daktu». Vanja iom pensis kaj diris : « Mi volas, ke mia paĉjo pli baldaŭ revenu hejmen de la milito». Li pririgardis punktojn kaj miris :» Kiel eblas skribi ion per punktoj kaj poste legi! Kiu inventis tiun ilon?» – «Louis Braille. En trijara aĝo li vundis siajn okulojn per akraĵo , plene blindiĝis kaj li kreis sistemon skribi kaj legi por blinduloj. Li laboris en Parizo, instruante blindulojn. Li vivis inter la 1809 kaj 1852 j.j. La ilo ricevis lian nomon. Blinduloj de la tuta mondo danke memoras lin». Vanja atente aŭskultis kaj petis : «Donacu al mi tiun ĉi folieton por memoro. Mi montru ĝin al la amikoj kaj rakontu pri tiu franco».

La mastrino invitis nin al la tablo. Satiĝinte ni tute senfortiĝis. Klava kuŝiĝis nin sur varman dormlokon ĉe la forno. Nur nun ni ekaŭdis mallaŭtan ĝemon. «Tio estas mia paĉjo, li malsanas», – klarigis Klava. Kiam ni vekigis, en la domo estis plena silento. Sur malnova divano, forte preminte sin unu al la alia, sidis larmokulaj infanoj. Klava silente preĝis antaŭ ikono. Dum ni dormis, la avo mortis. Oni enterigis lin en legomĝardeno apud la domo.

En la familio de Klava ni loĝis kelkajn semajnojn en paco kaj konkordo. Mi certas, ke tiuj infanoj kreskis honestaj homamaj personoj.

«Mi respondecas pri ilia vivo»

....Al ni estis bone kun ili , sed danĝero ĉiam apudis. Foje mi subite vekigis : en la kuirejo mallaŭte interparolis la panjo kaj Klara. Kaj jen – la konata voĉo devigis min elflugi el la lito kaj mi ekpendis surkole de Miŝa Anipkin, forte brakuminta kaj kisinta min. Li estis apude kaj tial eblis nun timi nenium kaj nenion. Tiel malofte mi ploris pro ĝojo. „Bonulĉjo, karulĉjo! Kiel do vi trovis nin?“ – „Mi estas ja skolto, mi certis, ke vi ne kapitulacos antaŭ la malamiko, ĉar vi estas partizaninoj“. En la kuirejo jam estis ĉiuj. Ni pretigis nin por la vojo. Klava metis en la saketon panon kaj peklitajn kukumojn. Prema estis nia disiĝo. Vanja kaj

dekjara Anjuta, larmegante petis nin resti almenaŭ ĝis la fino de la milito. Miŝa brakumis la infanojn kaj diris :» Mi respondecas pri ilia vivo, dum mi vivas. Vi renkontiĝos poste, post la venko». Ni foriris en malluman nokton. Sekvante Miŝan, ni ofte falis en profundan neĝon, el kiu li helpis al ni elrampi. Estis ankoraŭ mallume, kiam ni eniris grandan ejon. Miŝa puŝetis nin dekstren, enfojniĝis kaj silente foriris. Post malfacila irado laŭ senvojo ni mergiĝis en dormon. Min vekis la panjo. La ejon penetris febla taglumo. Apude iu umis. Nia najbarino el la vilaĝo Guŝĉino, la avinjo Vera! Al ŝi helpis fuĝi el ĉararo policano, akompaninta kaptitajn loĝantojn, forveturigatajn el la brulanta vilaĝo Guŝĉino. De ŝi ni eksciis, ke ankoraŭ kelkaj niaj najbaroj sukcesis saviĝi, ke partizanoj trovis iujn fuĝintojn kaj kolektis ilin ĉi tie en eksa kolĥoza tenejo. Ni parolis flustre, eblis aŭdi nur, kiel susuras fojno... Post ioma tempo pordo malfermiĝis, la tenejoj eniris viro kun granda plektita korbo surdorse. Lin alproksimiĝis du virinoj kaj li ion al ili transdonis. Ili malaperis en duonlumo de la tenejo, kaj la veninto ekis pleniĝi la korbon per fojno. Nin aliris virino en blanka lana tuko, donis al mi enmanen platbulkon kaj kruĉon kun lakto. Ankaŭ la panjo kaj la avinjo ricevis po platbulko, kaj lakton ni trinkis el unu kruĉo...

Mallumiĝis.»Ni eliru!» – iu diris. Apud la tenejo staris kelkaj virinoj kaj infanoj, la plej etan la patrino tenis surbrake. La avinjo Vera premis sin al ni. Al la fuĝintoj proksimiĝis Miŝa kaj duonflustre klarigis :» En tri sledojn ni kuŝigu infanojn kaj plenkreskulojn, kiuj ne povas moviĝi rapide. Kio ajn okazu, neniu el kuŝantoj en sledoj devos levi la kapon. Infanojn ni alligu. La ceteraj kuros kun mi trans la fervojo. Ni forveturigos vin al Moĥovo, al partizanoj». Neniu diris eĉ vorton. Miŝa aldonis : «Ni kunas». Oni metis min en la sledon kaj

alligis. La avinjo Vera instaligis apude, rifuzinte esti alligita. El sleda profundo ne plu eblis vidi ion. La sledo ekis. Post ioma tempo ĝi haltis. Ĉio rigidiĝis en sonora silento. De fore aŭdiĝis bruo de trajno, ĝi pli kaj pli proksimiĝis, jam estis tute apude. Kaj subite eksplodigis aeron tranĉa minaca fajfego de lokomotivo. Bruo de trajno rapide foriĝis kaj tute ĉesis, dissolviĝinte ie malproksime. La sledo ekiris, ien turnis kaj ekkuris supren, poste iomete malrapidiĝis kaj... mi ekvidis en la ĉielo brilegan lumradion, al ĝi aliĝis la dua. Eksonis pafoj, fariĝintaj senĉesaj. Ĉirkaŭe io fajfis. Mi eksentis, kiel ekkonvulsiiis la korpo de la avinjo Vera. Sledo kuregis malsupren, antaŭe viro kriegis :» Nu, karulino! Ek, ankoraŭ, pli rapide!» Malantaŭe pafado sonis pli malofte kaj pli mallaŭte. Ni veturis sufiĉe longe, poste turnis kaj haltis.

Oni aliris la sledon, mi estis malligita kaj tuj trafis la brakumon de la panjo. Ni proksimis al lignofajro, kie jam kolektiĝis homoj. Flanke staris du sledoj, el kiuj partizanoj portis infanojn kaj virinojn. Ĉe la lignofajro oni metis virinon, kelkaj homoj kliniĝis super ŝi. Kiam ili rektiĝis, iuj faris kruccsignon, viroj levetis orelumĉapojn. Surmeĝe kuŝis la avinjo Vera.

Kie do estas la tria sledo? Oni atendis... La tempo pasadis...

Apud la estingiĝanta lignofajro staris Tonja, elportinta la trijaran filon el la tenejo kaj enslediginta lin. Ŝi demandis nenion kaj subite, metinte la manojn al la brusto, ŝi eklamentis kantece : «Ho, infaneto mia amata, unusola!Pardonu min, ke mi ne savis vin! Kial mi ne estis kun vi apude? Mi levus vin alte super marĉo! Vi restus viva kaj renkontus la paĉjon! Ho, pro kio, pro kio la morto disigis nin ... Fileto mia!». En tiu terura nokto ĉe la finbrulanta lignofajro super senrandaj neĝoj ĝis la ĉielo mem leviĝis ploro de la juna patrino el la eta pskova vilaĝo Guŝĉino.

Mia panjo pli forte premis min al si. Mi sentis, kiel ŝi tremas : jam kelkfoje la morto povis forpreni ŝian ununuran filinon. Marĉoj, arbaro, ĉielo kaj pli ol dudeko da homoj aŭskultis ploron de la patrina koro.

Senfortiĝintan Tonja-n oni ensledigis, volvis per ia vesto. Miŝa eksidis apude, brakuminte ŝin je la ŝultroj :»Mi sendis kurieron al la taĉmento. Skiistoj serĉos kaj trovos la sledon. Frosto ne tre fortas... Ĉu vi varme vestis la fileton?»— «Jes, feltbotetoj, ŝafpelteto, fela ĉapeto, duoblaĵ lanaj pugnogantetoj, vatita pantaloneto...».

....Sed marĉo englutis ĉiujn. En taluso de la fervojo kuglo trafis partizanon, kiu gvidis ĉevalon. Pro pafado, pro blindige brilaj lumjetiloj la frezeziĝinta animalo ekkuregis, devojiĝinte kaj enmarĉiĝis...

Renkonto

Kiam foje nokte Miŝa Anipkin venis por ni, Klava kaj infanoj larme petegis lin lasi nin kun ili. Sed Miŝa forkondukis nin, klarigante, ke li persone respondecas pri ni. En granda danĝero ni trairis la fervojon kaj trafis arbaron. Partizanoj lokis nin en staban terkabanon, ĝi havis kunligon kun la Granda Tero, laboris telegrafistoj. Post longa vagado tra arbaro ni kun la panjo rapide ekdormis. Mi songis la paĉjon, mi aŭdis lian voĉon. «Paĉjo!» – mi vekigis de la propra krio. Kaj silento...

....Kaj poste...

“Filinjo! Tomenjo! Ĉu estas vi?” Kaj jen mi sidas sur genuoj de la paĉjo, la panjo apudas. La terkabano estis plenigita de partizanoj, multaj ploris, ja ĉiu havis ie familion, infanojn, edzinon, gepatrojn. Kiel do okazis, ke la paĉjo trafis ĝuste tiun partizanan taĉmenton? Li estis sendita el Leningrado al fronto julie de la 1941 jaro kaj aŭguste li iĝis kaptito kaj trafis koncentrejon en la urbo Porĥov, 200 kilometrojn for de nia vilaĝo G***, kie renkontis la militon ni kun la panjo! Kaj li sciis pri tio. Mia paĉjo estis homo tre komunikigema, elvokanta al si favoron. Li konatiĝis kun policanoj, konfidigis ilin, kaj ili helpis al li fuĝi. Pretigante sin al fuĝo, la paĉjo kreskigis barbon, faris lambastonojn, lernis uzi ilin. Li kunhavis falsan dokumenton pri sia plena fizika netaŭgeco. Li atingis la vilaĝon, kie tiam ni loĝis ĉe Klava, sed li ne povis scii pri ni, ĉar ni ne elhejmiĝis kaj neniu vidis nin. Ĉi tie la paĉjo informiĝis, ke Guŝĉino-n faŝistoj forbruligis kaj la loĝantojn forsendis al Germanio. Samloke li eksciis pri partizanoj, situantaj en arbaro post la fervojo. Ĝuste tien li direktis sin. En arabaro agis kelkaj partizanaj taĉmentoj. La paĉjo trafis tiun, kiu nomis sin „Ora hordo“.Celo de la taĉmento estis ne servi al malamiko, konservi siajn vivon kaj sanon. La simpla celo. Oni faris kuratakojn al vilaĝoj, forprenante nutraĵojn ĉe loĝantoj. Fojfoje oni ne malatentis ankaŭ malamikajn manĝaĵojn. Kompreninte tion , la paĉjo baldaŭ forlasis la hordon kaj profundigis arbaren, kie li trovis verajn partizanojn.

Al la 1943 jaro nia partizana taĉmento prezentis gravan timigan forton por faŝistoj. Kaj ili fojfoje faris rabatakojn kaj ĉirkaŭbarojn en arbaro. Pro interpafado ĉirkaŭe fajfis kugloj. La komandon «kuŝiĝu» malfacilis plenumi : subpiede gluglis marĉo, kiu forglutis dekojn da homoj.

Krom vundoj multaj suferis malvarmumajn malsanojn. La panjo ekmalanis je pneŭmonio. Sen kuracado en hospitalaj kondiĉoj ŝi ne povus elvivi. Kaj tiutempe partizanoj unu el arbarkampoj utiligis kiel aerodromon.

Preskaŭ ĉiunokte al ni alflugis la aviadilo U-2, venigante medikamentojn kaj kuracistojn el la Granda Tero. Reen ĝi portis vunditojn. Interkonsilio de niaj medicinistoj decidis sendi la panjon en hospitalon. En frosta januara nokto oni veturigis nin en sledo al la fluga kampo. Turmenta estis nia adiaŭo kun la paĉjo. «Filinjo, gardu vin kaj la panjon. Mi promesas reveni al vi. Atendu».

Sur la Granda Tero.

Ĝis nun mi vidis aviadilojn nur sur bildoj aŭ en filmoj. Ili rememorigis al mi pri birdoj. Sed tio, kio staris kaj muĝis en la arbarkampo, timigis min. Du grandaj alpremigataj unu al la alia korboj sen kovriloj staris sur radoj, super ili sterniĝis flugiloj. Vosto kaj turniĝanta helico finis eksteraĵon de tiu muĝanta monstro. Al la panjo oni helpis eniĝi en la korbon, kien oni ankaŭ enĵetis min. La antaŭan korbon okupis aviadisto. Ni eksentis skuadon, motoro plifortigis muĝadon, la korboj suprensaltis. Ni konfidis niajn vivojn al la sorto kaj al jena stranga monstro.

Mi ekstaris malgraŭ oponoj de la panjo kaj elrigardis el la korbo. Sube estis malluma densa arbaramaso. Kaj super ni – grandega luno. La tuta ĉielo, kiel tapiŝo, estis brodita per steloj. Monotona motora muĝado trankviligis nin, kredo je la vivo revenis. Baldaŭ glacia vento devigis min kaŝiĝi en profundo de la korbo kaj alpremis min al la panjo. Subite nin ial ekis premi al la fundo de la korbo. Mi denove elrigardis kaj laŭ pozicio de la luno komprenis, ke la aviadilo altiĝas. Poste, rigardinte suben, mi ekvidis grandegan kvanton de brilaj fajroartaĵoj, eksplodintaj sub ni pireteknikaĵoj. Iaj longaj fajraj brulŝtipetoj malrapide supreniĝis al la ĉielo, penante trafi nian aviadilon. Tiu bildo ensorcis min. En krakado de motoro kaj venta bruo mi preskaŭ ne aŭdis tiujn eksplodojn, sed ĉiu el ili kaŭzis skuiĝeton de la aviadilo. Sube estis frontlinio. Kaj ĝi estis la plej vera linio, etendiĝinta laŭtere je granda distanco. Multnombraj ekflamoj de obusoj, alflugintaj de ambaŭ flankoj, reliefe distingis tiun linion surfone de la malluma tero sub ni.

U-2 ne povas plialtiĝi al pli ol tri mil metroj (cetere, mi povas erari). Ni supreniĝis kiel eble pli alten, kie fortega frosto faris al ni koleran ŝercon : abrupte venis silento, la motoro senbruiĝis kaj ni ekfalas. Kiom longe daŭris silento mi ne scias. Sed subite la motoro ekkantis kanton, savantan nin. La aviadilo abrupte ekflugis supren, la fronto restis malantaŭe. Obusoj ne plu videblis. Ni trafis la Grandan Teron.

En la aerodromo oni kondukis nin en vastan ĉambron, kie estis multe da aviadistoj. Oni aliris nin, salutis. Kaj nia aviadisto, regalante nin per pano kun butero, diris : «Kredu, ke hodiaŭ vi renaskiĝis kaj vivos longe-longe». Bedaŭrinde al nia aviadisto ne bonŝancis longe vivi : post kelkaj horoj portante trans la frontlinion vunditan partizanon li estis paffaligita kaj pereis.

La aerodromo situis apud negranda vilaĝo. Alveturigitojn de tiu flanko oni transigis al profunda ariero. Nin kun la panjo oni loĝigis al du maljunulinoj. La tria kunloĝanto estis mezaĝa viro. Unue, li estis surdmuta kaj neniel eblis kontakti lin. Due, li estis plene indiferenta al la ĉirkaŭantoj. Trie, li neniel helpis en la domo. La avinoj hakadis lignaĵon, portadis akvon. Mi lavis kaj balais plankon, lavis tolaĵon, flegis la malsanan panjon. Sed mia ĉefa tasko estis dufoje viziti kuirejon de aviadistoj kaj alporti tagmanĝaĵojn. Mi alportis kaldronetojn kun kaĉo, supo, panpecetoj kaj dividis ĉion por triopo. Baldaŭ mi rimarkis : dum nia

tagmanĝo la avinoj foriris el domo aŭ okupiĝis pri io en provizejo. Foje kuiristo proponis al mi : «Eble aldoni al vi brasiksupon kaj kaĉon?» Mi ekĝojis. Ekde tiam parton de manĝaĵoj mi forpotadis al la provizejo.

Mi ofte ellitiĝis nokte por kontroli la panjon kaj viziti necesejon ekstere. Foje mi ekvidis, ke la surdmutulo ne estas en la domo kaj decidis atendi lin, sed li ne revenis. Mi bezonis necesejon kaj elhejmiĝis. Pado al la necesejo iris dekstren. Mi iris maldekstren al tenejo. Stop! En la tenejo interparolis du viroj, la voĉoj estis por mi nekonataj...

«...al vi restis nelonge atendi. Baldaŭ ni transportos vin.» -

«Ĉu iom toleri, vi diras? Ĉu facilas ŝajni surdmutulon? Aldone la knabinaĉo senĉese fulmetas antaŭ la okuloj. Sed mi ja estas sana muĝiko!» – «Se vi nur tuŝos la knabinaĉon , vi fiaskigos la tutan aferon. Kaj mi la unua mortigos vin!». Mi ne plu aŭskultis. En la kapo frapis : li ne estas surdmuta! Li volas murdi min! Kiel do mi enhejmiĝu nerimarkite? Mi ekaŭdis bruon de alproksimiĝanta malalte fluganta aviadilo, sukcesis senbrue penetri en la domon kaj enlitiĝi. Finfine ankaŭ li revenis. Frumatene nin vekis sanitaristoj kun portilo. La panjo kaj mi estis forveturigitaj al la fluga kampo, kie staris sanitara duloka aviadilo. Nin oni metis en du kestojn, fiksis per rimenoj, fermis per kovriloj kaj en plena mallumo ni supreniĝis en aeron. Baldaŭ ni alteriĝis en la urbo Toropec, kie troviĝis hospitalo.

En hospitalo.

.... Mezlernejo de la urbo Toropec estis aliformigita en hospitalon. En ĉiuj ejoj, eĉ en koridoroj estis malvaste enŝovitaj litoj, benkoj, tabullitoj sur stabloj, seĝoj, fojnŝtopitaj sakoĵ. Ĉie kuŝis vunditoj. Ĝemado, petegoj helpi, nekomprenebla deliro tutdiurne plenigis la trietaĝan konstruaĵon. Odoro de sango, de putranta homa korpo, de medikamentoj naŭzigis.

Ni kun la panjo estis lokitaj en kvarlokan ĉambron. Apud mi kuŝis juna virino Valja kun antaŭnelonge amputita dekstra mano. «Kaj vi, birdeto, por kio enflugis ĉi tien?» – karese demandis ŝi. – «Nu, bone, vi helpos min, instruos manĝi supon per la maldekstra mano.» Plue kuŝis junulino Anja, ŝi estis 18-jara. Ŝi ne surhavis bandaĝon , sed distingiĝis ŝia granda ventro. Ŝi decidis eviti malhonoron, naskinte bebon sen edzo, trinkis ian venenaĵon, sed restis viva. Ŝi senĉese ploris, rifuzis kuracadon, ne volis reveni hejmen al la familio kun ankoraŭ ok malpli aĝaj gefratoj. Kuracistoj konvinkadis Anja-n, ke ŝi resaniĝos kaj naskos sanan etulon, sed tio provokis nur ŝiajn novajn histeriojn.

Dum noktoj al Valentina venadis viroj kaj faris tian gajadon, ke ne eblis ekdormi. Nur nun mi komprenis, kion bezonis de mi la kvazaŭ surdmutulo. Tage Valentina satdorme ripozadis.

Por nokte dormi mi decidis trovi por mi tagajn okupojn. Mi ekiris tra la ĉambroj, kie oni renkontis min afable kaj ĝoje: en la hospitalo ne estis aliaj infanoj. Vunditoj alvokis min, demandis kial mi estas ĉi tie, rakontis pri si kaj siaj infanoj. Iu petis akvon, por iu mi ordigis litkovrilojn, bandaĝojn kaj kusenon, se oni havis ĝin. Tutan tagon mi iradis de ĉambro al ĉambro, komunikiĝante kun vunditoj. Kompense dum noktoj mi nun profunde dormis. Foje min vokis juna soldato. „Ĉu vi ŝatas kanti? Kantu ni mallaŭte „Katjuŝa-n“, ĉu?“ – petis li. Ni duonflustre ekkantis. De apude aliĝis agrabla tenoro. «Kantu pli laŭte!» – iu petis nin desur malproksima lito. Tiel komenciĝis mia aktora kariero. Matene mi

eniradis en unu el ĉambroj: „Bonan matenon, kamaradoj resaniĝantoj! Ni komencu la koncerton!“ Mi kantis ĉion: de porinfanaj kantoj ĝis operaj fragmentoj. Se mi ne sciis vortojn, mi elpensadis ilin. Mi deklamis versojn, rakontis fabelojn. Antaŭ la milito per radio estis dissendata» Teatro ĉe mikrofono». Mi ŝategis teatraĵojn de Aleksandro Ostrovskij kaj sciis multajn el ili. Rakontante enhavon de la teatraĵoj, mi strebis prezenti ĉiujn rolojn, kio ofte elvokis ridon kaj tondrajn aplaŭdojn de aŭskultintoj. Fojfoje aŭskultintoj enmetis siajn replikojn, pridiskutis agojn de herooj, donis al ili konsilojn, rakontis epizodojn el nia vivo, kvankam herooj de la teatraĵoj vivis en la deknaŭa jarcento, sed ni en la dudeka. Aparte populara estis teatraĵo pri Balzaminov el la spektaklo «Festa dormo antaŭ tagmanĝo».

En unu el noktoj mi vekiĝis pro laŭtaj voĉoj kaj kurado. «Ho, panjo mia!» – kriegis Anja per nehomvoĉo. “Streĉiĝu! Spiru pli profunde!” – ordonadis al ŝi iu virino. Kaj subite mi ekaŭdis infanan krion. Apude mallaŭte suspiris Valja. “Feliĉulino!” – ŝi flustris.

Survoje de hejmenreveno

Kiam la panjo resaniĝis, oni elhospitaligis nin kaj forsendis al nenieno. Sed tio ne timigis, ni estis sur la gepatra tero. La panjo decidis atingi la fraton de mia paĉjo en la stacio Msta, surborde de la samnoma rivero. Monon ni ne havis. En la hospitalo ni ricevis nutraĵon por tri tagoj. Ie perpiede, ie per samvoĵaj ĉaroj, ie en vagono de vartrajno ni atingis la stacion Bologoje. La frato de la paĉjo onklo Tolja laboris en fervojo kaj tial ne estis en fronto. Ni trovis lin en deponejo. Tridek kilometrojn ĝis la stacio Msta ni veturis «lukse» per lokomotivo.

Sur vojo al la hejmo

Forlasinte ĝin, ni venis rekte hejmen de la onklo Tolja, timiginte la tutan familion per nia eksterajo. Ni aspektis pli nigraj ol negroj. Eĉ la kato, balbutante, elkriegis per nekata voĉo «miaŭ – miaŭ» kaj elsaltis fenestren, reveninte hejmen nur post kelkaj tagoj. En la granda domo de la onklo Tolja estis vaste, varme, komferte kaj sate. Ni volonte flegis kokinojn, porkidojn, ŝafinojn, bovinon. Mi paŝtis dikajn kriemajn anserojn. La parencoj estis zorgemaj kaj atentaj al ni. Ofte ili ŝercis pri nia aspekto, en kiu ni aperis ĉe ili.

Tutdiurne al Uralo kaj reen iris vartrajnoj. Fojfoje ili longe staris en la stacio, vagonaroj estis streĉe gardataj. En dismovitaj pordoj ni vidis kaptitajn germanojn kaj niajn soldatojn. Proksimiĝi al ili estis rigore malpermesite. Sed foje el vagono elsaltis soldato, levis min surbraken kaj ekturmiĝis. «Paĉjo mia! Viva!» – mi ne povis kredi je mia feliĉo. La paĉjo plenumis sian promeson! Alkuris armitaj eskortantoj. Ili deĵetis min surteren kaj la paĉjon ektrenis en trajnon. Aŭdiĝis timemaj voĉoj.» Kial vi, kiel brutaro, ne permesas al la patro saluti la filinon?» La paĉjo sidis surtere ĉirkaŭpreninte per la manoj la kapon. Liaj ŝultroj tremtremis. Li en amaro kaj ofendo penisi pri tio, kial juĝis lin la milita tribunalo.

Ja kiam komenciĝis la milito, li mem, ankoraŭ ne ricevinte la avizon el militkomisarejo, venis al militserva punkto kaj estis direktita al fronto. Lia reĝimento estis ĉirkaŭita kaj militkaptita. Sed li sukcesis fuĝi el la kaptitejo kaj daŭrigis batali por la Patrio en partizana taĉmento. Pro kio juĝis lin la milita tribunalo? Kaptitojn la juĝo kondamnis al pafmortigo kiel perfidulojn de la Patrio. Mia paĉjo ne estis pafmortigita; oni konsideris lian aktivan partoprenon en la

partizana movado. Ankaŭ punbatalionon li evitis. Sed konfidon li ne havis. Oni ne sendis lin al filtradejo. Nun li veturis eskortite kune kun kaptitaj germanoj por labori en profunda ariero. Pro kio?!

La paĉjon aliris oficiro, komandis ion. La paĉjo ĵetis sin al mi, malferminte la brakumon. Mi kisadis lian nerazitan kaj malsekan pro larmoj vizaĝon. Oni donacis al ni kvin minutojn da feliĉo. Dankon!

Kiam venis la jaro 1944, la panjo decidis reveni al Leningrado. Ni veturis al la ĉefa stabo de partizanaj taĉmentoj, kie oni pretigis por ni permesilojn por eniri en la urbon. Sed evidentiĝis ke loĝejon ni ne havas. En la domlibro ni estis en la listo de mortintoj, kaj en nia eksa apartamento loĝis aliaj homoj.

Komenciĝis juĝaj procesoj. Dum juĝistoj «revivigadis» nin kaj akceptadis decidon pri revenigo de nia apartamento, mi estis lokita en la infandomon numero 25, kaj al la panjo donis rifuĝejon la najbaroj. Kiam finfine ni eniris nian apartamenton, du ĉambroj kaj kuirejo estis malplenaj. Nur granda grizkolora urseto kuŝaciis surplanke. Eĉ la antikvan pargeton oni forbruligis. Pasiginte nokton sur la nuda planko, ni estis feliĉaj.


En julio de la 1945 jaro al ni el Sverdlovsko revenis la Paĉjo. Aŭtune el Latvio revenis la avino, la onklino kaj ŝia filino Nina, kie ili en unu el izolbienoj plenumadis la plej malpurajn laborojn. La avino loĝis ĉe ni ĝis sia morto. Ŝi petis enterigi ŝin en la vilaĝo apud la edzo, kaj ni plenumis tion. La patro de Nina revenis invalido. Li finis universitaton kaj sukcese instruis matematikon en mezlernejo. La vivo daŭris.

Foje al ni venis Miŝa Anipkin. En fronto li estis grave vundita kaj plene blindiĝis. Al la demando pri la vivo li rakontis : «Mi trovis malnovan harmonikon kaj nun ĉiumatene iras al bazono, ludas kaj kantas. Kaj nian kanton «Sur avinaj teroj gajis du anseroj» mi kantas nepre. Sed mi iomete reverkis ĝin. Da anasoj nun estas ne du, sed tri. Unu kun pafita flugilo ne povas flugi, tio estas pri mi.“ Nia kanto rememorigadis al li tiun tagon, du amikojn, tri virinojn kaj du timigitajn knabinojn. Pri Zaĥar kaj Ŝurko ni sukcesis ekscii nenion. Sed pri la gastoj numero du io sciigis. Jam post la milito la panjo renkontis en Leningrado Nadja-n kaj tiu rakontis, ke post la regalado en nia domo ili kun fritz tre malsanis, lin oni eĉ enhospitaligis kaj ien forveturigis. Kaj ŝi mem apenaŭ restis viva, ĉar ŝi kaj fritz havis tiom gravan misfunkciadon de la stomakoj kaj intestaro, ke ili mem malpurigis, malbonŝancis al la sledo kaj eĉ al la servosoldato. La fakto estas, ke la panjo faradis du specojn de tiu alkoholaĵo : «la portabla vino» havis ĉiujn ecojn de la plej ordinara neforta vodka, sed «konjako» efikis al la homa organismo kiel fortega laksigilo. La panjo tamen ne rakontis al Nadja pri sia mirkonjako, modeste prisilentante sekreton de sia batalarmilo.

Januaro 2019,
Sankt-Peterburgo

*Tradukis K. Ilutoviĉ (Elektrostal)
Provlegis S.Smetanina (Moskvo)*

Image pri Baza literatura krestomatio



Ĉu oni povas verki recenzojn pri nelegita libro?

Kiam aperis nova versio de “Baza literatura krestomatio”, mi tuj esprimis mian intereson kaj deziron recenzi. Mi havas la eldonon de 1982, trovis en interreto la enhavtabelon de la nova eldono, konstatis ke el 64 nove aldonitaj pecoj, mi jam diversloke trovis kaj legis 46, kaj, sciante ke rusia poŝto funkcias ege malrapide (sendaĵo el eksterlando drivas minimume monaton), por ne perdi tempon, ekverkis la recenzojn... Jen kio malnetiĝis:

* * *

Ĉiu el ni post fino de baza kurso alfrontis la demandon: por kio apliki Esperanton? Tre multaj, i.a., volas legi beletron, samkiel en la denaska lingvo. Tamen, se en naciaj lingvoj ekzistas tuta sistemo de literatura klerigo, ekde bazlernejo ĝis “publika opinio” – en Esperanto ĉio pli komplikas. La aŭtoroj multas, libroj des pli – kiel orientiĝi, kiel elekti? Bona varianto estas komenci de krestomatio, ricevi impresojn pri kelkdek aŭtoroj, kaj poste jam konscie akiri verkojn laŭ siaj gustoj kaj preferoj.

“Fundamenta Krestomatio” de 1903 estis multfoje reeldonita poste, tamen nun aspektas arkaike kaj naive. Kaj fakte, dekomence ĝi havis alian celon. Do nesubtaksebla estas la “Baza literatura krestomatio” (1979), redaktita de Vilmos Benczik. La unua eldono rapide elĉerpiĝis, en 1982 sekvis la dua, iom ampleksigita, kaj en 1986 aperis la tria (identita al la dua). Baldaŭ post tio, bedaŭrinde, eldon-agado de Hungara Esperanto-Asocio kolapsis.

Dua eldono de “Esperanta antologio” (1984), duvoluma “Trezoro. La Esperanta novelarto” (1989) kaj “Nova Esperanta Krestomatio” (1991) estas pli ampleksaj kaj multe pli kostaj, do destinitaj por jam spertaj literaturŝatantoj. Vasta publiko bezonas libron ĝuste bazan. Kaj dezirinde – ĝisdatan, ja dum pasintaj jardekoj aperis pluraj novaj aŭtoroj kaj verkoj.

Do nepre laŭdindas la nun aperinta kvara, grave kompletigita eldono. Al 134 verketoj aŭ verkfragmentoj de 59 aŭtoroj aldoniĝis la “Postrikolto”: 64 verketoj aŭ verkfragmentoj de 23 novaj aŭtoroj; krome en la unuan parton estas enmetitaj du pliaj prozfragmentoj el Karolo Piĉ kaj Eli Urbanová. Aldoniĝis ankaŭ biografioj de ĉiuj aŭtoroj, multe pli ampleksaj ol la priskriboj en la unuaj eldonoj, kaj pri pli granda nombro da personoj (verkis Aleksander Korĵenkov kaj Halina Gorecka).

Recenzante antologiojn kaj krestomatiojn, oni kutime taksas ne la verkojn mem (plejparte jam konatajn, almenaŭ por literatur-spertuloj), sed la principojn de kompilo. Evidente taksu la unuan parton, finkompilitan en 1982, estas iom

malfrue, ni nur menciu ke Kalocsay estas reprezentita per 9 pecoj, Baghy – 8, Auld – 7... kun tio ne eblas malkonsenti. Cetere, Zamenhof ricevis nur 6, kaj eĉ tio eble estus tro, tamen estas deviga bazo...

Por la “Postrikolto”, miascie, ĉefe István Ertl (kunlaboris ankaŭ Aleksander Korĵenkov kaj Russ Williams) elektis novajn aŭtorojn, kaj poste la vivantaj aŭtoroj mem decidis – kion proponi por la bukedo. Fakte, nemalbona principo, ja kiu scias verkojn de iu certa aŭtoro pli bone ol li mem? Kaj la arta gusto de I. Ertl konatas kaj neriproĉeblas... nu, preskaŭ.

Do kion ni vidas? Oni povas konsenti, ke Camacho estas tre talenta poeto inter nun vivantaj (liajn personajn trajtojn oni prefere prisilentu), sed 17 pecoj de li?? Ĉu vere li valoras kiel Kalocsay kaj Baghy kune?? Pli atenta esploro tamen konstatigas, ke la 17 eroj de Camacho estas plejparte mallongaj, do okupas entute 8 paĝojn, dum Kalocsay estas prezentita per 18 paĝoj, Baghy per 17.

Oni povas longe diskuti, kial aperis tiuj aŭtoroj kaj ne aperis tiuj ĉi. Afero de gusto. Miaopinie la elekto akcepteblas, tamen mi bedaŭras, ke (ĉu pro troa modesto?) I. Ertl enmetis neniun propran poemon...

* * *

Tamen pasis monatoj, enmiksiĝis la kronvira epidemio, kaj la rusia poŝto pruvis sian aĉan reputacion: post duonjaro iĝis tute klare, ke la ekzemplero de “Baza literatura krestomatia”, sendita al mi, perdiĝis senspure. Mi, tamen, tre bedaŭras forĵeti jam verkitan tekston. Do...

Kaj mi ne perdas esperon, ke iam mi tamen ricevos ekzempleron, aŭ almenaŭ – elektronikajn tekstojn de mankantaj por mi 18 eroj – kaj do tiam povos reverki tiun ĉi recenzon.

* * *

Mi proponis tiun ĉi recenzon al “Beletra Almanako”. István Ertl dekomence varme aprobis ĝin, tamen nature avertis, ke decidis la tuta redakcio. Aliaj redakcianoj tamen, kiel diras mia kolego, *sentis pisenismon*. Laŭvorte: “Inter la opinioj de la redakcianoj estis: recenzo ankaŭ devus pritaksi la ecojn de libro kiel libro”. Nu, ĉu vere mencio pri (mal)bonkvalita papero kaj tiu (eĉ plej ofta) pri disfalo de paĝoj post (aŭ eĉ dum) lego, pro aĉkvalita gluo, same gravas kiel enhavo?... Alia kontraŭargumento estis, “ne krei precedencon”. Hmm, ĉu oni neniam kreu precedencon de senŝofora aŭto? De pago per poŝtelefono? De flugo en aero (ja homo ne havas flugilojn – do Dio klare malpermesis al homo flugi, ĉu ne??) Ĉu traleginte 46 el 64 novaj libropartoj (kaj 134 malnovajn, do entute 180 el 198), oni ne ricevas adekvatan imagon pri la antologio?...

Valentin Melnikov

Baza Literatura Krestomatia / Komp., red. Vilmos Benczik, István Ertl, Aleksander Korĵenkov, Russ Williams; Antaŭpar. Aleksander Korĵenkov; Enkond. Vilmos Benczik; Biografioj: Vilmos Benczik, Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. — 4a eld., kompl. — Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: Litova Esperanto-Asocio, 2019. — 368 p.; 500 ekz.

ISBN 978-609-95087-7-1

Baza Literatura Krestomatia estos aĉetebla en la [libroservo de UEA](#) kaj en aliaj grandaj Esperantaj libroservoj kontraŭ **27 eŭroj** (plus sendokosto).

Loĝantoj de Ruslando mendu rekte ĉe [Sezonoj](#).



Starigo de nova literatura premio

“Laŭro de la Akademio”

En 2020, la Akademio starigis novan literaturan premion “**Laŭro de la Akademio**” aljuĝota al libroj “arte signifaj, lingve perfektaj kaj evidente kontribuantaj al evoluigo de esperantlingva kulturo”. Delonge tiu ĉi ebleco “doni premiojn al la aŭtoroj de la plej bonaj aperintaj verkoj” ekzistis inter la statutaj celoj de la Akademio, sed estis neuzita. La ĵurio, aprobita de la Akademio, konsistas el: Carlo Minnaja (Italio), Javier Alcalde (Katalunio), Edmundo Grimley Evans (Britio), Nikolao Gudskov (Rusio), Jesper Jacobsen (Francio), Valentin Melnikov (Rusio), Barbara Pietrzak (Pollando). Premiindajn verkojn bonvolu proponi al Carlo Minnaja carlo.minnaja@gmail.com aŭ iu ajn alia membro de la ĵurio. La unua limdato por propono de premiinda verko estas la **30-a de junio 2021**.

(3-a novembro 2020)

Regularo

Art. 1 – La premio konsistas el diplomo kaj pago de 100 € al la aŭtoro. Ĝi estas aljuĝebla al libro en Esperanto eldonita maksimume kvin jarojn antaŭ la limdato por konsiderado. La verko premiita devas plenumi la sekvajn kriteriojn: esti arte signifa, lingve perfekta kaj evidente kontribui al evoluigo de esperantlingva kulturo.

Art. 2 – La premiota libro devas esti oficiale publikigita en papera aŭ elektronika formo kaj libere akirebla en komune atingeblaj libroservoj aŭ distribuejoj de elektronikaj eldonoj.

Art. 3 – La ĵurio, funkcia en la nomo de Akademio de Esperanto, konsistas el minimume 5 membroj aprobitaj de la Akademio laŭ propono de la Sekcio pri Literaturo. Aprobo de nova ĵurio okazas dum la du monatoj post la anonco de la antaŭa premio. Verkoj de ĵurianoj ne estas premieblaj.

Art. 4 – Presentas la libron por la premio iu Esperanto-organizaĵo (landa aŭ internacia asocio aŭ simile), eldonisto aŭ la aŭtoro mem al ajna membro de la ĵurio, kiu plusendas al la aliaj ĵurianoj. La prezentinto disponigas la libron al la ĵurio prefere en elektronika formo. La libroj por la premio estas prezenteblaj dum la tuta jaro, sed por esti konsiderata por la premio en la kuranta jaro ne pli malfrue ol la 30-an de junio.

Art. 5 – La premio povas esti aljuĝata ĉiujare, se troviĝas indaj kandidatoj. Libro povas esti deklarita gajninto de la premio, nur se la favoraj voĉoj interne de la ĵurio atingas minimume du trionojn de la plena kvanto de ĵurianoj.

Art. 6 – Ĉiujare estas aljuĝata ne pli ol unu premio “Akademia Laŭro”. Libro proponita sed ne ricevinta premion en la kuranta jaro povas ricevi la premion poste. Libro de la sama aŭtoro povas ricevi la premion ne pli ofte ol unufoje dum 5 jaroj.

Art. 7 – La rezultoj estas anoncataj la 15-an de decembro, en la Tago de Esperanto-Libro.

Kontraŭvirusa marŝo

*Muziko de Mikaelo Povorin,
teksto de Klara Ilutoviĉ*

Brilu juna vigleco kaj sano,
Verve lumu agemo sen lac'.
Estu sana vi, samideano!
La viruso vin lasu en pac'.

Refreno 1

Post la teda kvaranten'
pligajiĝu kor',
Post la longa izolec' timo
iru for!

| 2-foje

Ne timigu babil' pri danĝero,
Ne vagadu de pesto fantom'.
Vivu ajna virus' en libero,
Nur ne iĝu minaca por hom'.

Refreno 2

Post la ĝena singardem'
plifortiĝu kor',
Post la griza tempopas'
premo iru for!

| 2-foje

Senutilu do masko kaj ganto,
Volvu ilin profunda forges',
Kaj kunigu nin plu Esperanto
En la klubo, tendaro, kongres'.

Refreno 3

Post la brua nervozig'
plimildiĝu kor',
Post la truda timoplen'
streĉo iru for,
Streĉo iru for, streĉo iru for!

| 2-foje

Kontraŭvirusa marŝo

Teksto de Klara Ilutoviĉ

Muziko de Mikaelo Povorin

$\text{♩} = 120$

C F C Em F

Bri-lu ju - na vig-le - co kaj sa-no, ver-ve lu - mu a-ge - mo sen

C B7 E7 Am D7 *ritenuto*

lac'. Es-tu sa - na vi, sa - mi-de - a - no! La vi - ru - so vin la - su en

G7 F *a tempo* Em G7 C

pac'. Post la te - da kva-ran-ten' pli-gaj - i - ĝu kor', post la

I. D7 Em F G7 II. B♭ G7 C

lon - ga i - zo-lec' ti-mo i - ru for! Post la i - ru for!

(Aŭskultblas ĉe <https://www.youtube.com/watch?v=IV9jbmKp0Gg>)

CERBE kaj KORE

n-ro 17 (85), novembro 2020

Kultura suplemento al la revuo "Ponto" n-ro 115

[eksa Bulteno de REU (BdR)]

"Ponto" estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo **Rusia Esperantista Unio**

Oni rajtas uzi kaj represi ĉiujn materialojn de la eldono nur kondiĉe de ĝusta indiko de la fonto

CkK atendas viajn prozajn, poeziajn, interlingvistikajn, historiajn, instru-metodikajn kaj scienc-popularajn kontribuojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov nikolao@yandex.ru.

Estraro de Rusia Esperantista Unio

Redaktofino 29.11.2020